# EL POPOLA ĈINIO

3-4
1977


中国报道







En novembro, 1964, kiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kun la Partia kaj Registara Delegacio de Ĉinio sub sia gvido, partoprenis en celebra aktivado de la 47-a datreveno de la Oktobra Socialisma Revolucio de Sovetunio, li rezolute rebatis la malican atakon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj per tio defendis Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson. Kiam Kamarado Ĝoŭ Enlaj revenis de Moskvo al Pekino, li estis varme bonvenigata de Prezidanto Maŭ, Prezidanto Ĝu De kaj pekinaj popolanoj.



En 1946, Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj Kamarado Dong Bivu en la korto n-ro 30 de Mejjuan Hincun de Nankino




En septembro, 1966, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Kamarado Kang Ŝeng en mitingo de Pekino por akcepti revoluciajn instruistojn kaj lernantojn venintajn de diversaj lokoj de nia lando



En februaro, 1960, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Kamaradino Deng Jingĉaŭ inter junaj pioniroj



decembro, 1957, Ĉefmini-
o Ĝoŭ, Vicĉefministro Ĉen
kaj Vicĉefministro He Long
ekspozicio



En junio, 1962, Ĉefministro Ĝoŭ en intima interparolo kun laboristoj


En marto, 1966, Ĉefministro Ĝoŭ ame konsolis la plagitajn popolanojn en la sismoplagita Hingtaj.





En novembro, 1965, Ĉefministro Ĝoŭ akceptis la reprezentantojn de la trupo de ĈPLA meritoplenajn en mara batalo.

En julio, 1965, Ĉefministro Ĝoŭ kaj diversnaciecaj gejunuloj kune kantis revolucian kanton



EL POPOLA ĈINIO
中國報道
1977
N-ro 3-4
(223)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

*KOVRILO:*

En la foto-ekspozicio por memorigi la unuan datrevenon de la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ

*DORSKOVRILO:*

Altaj montoj en nubmaro

KOREKTO

En la teksto de la kolora bildpaĝo "Hang-Gia-Hu-a Ebenaĵo" de n-ro 2, l. 9, *Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj Deng Hiaŭping* devas esti legata **Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ.**

# Enhavo

Rememoro pri nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ 3

Kie estas vi, Ĉefministro Ĝoŭ? . . . . . . . . 19

Batalo por la filmo pri Ĉefministro Ĝoŭ . . . . . 21

Kial ili sufokis la filmon "La Pioniro"? . . . . . 26

"Pri Dek Gravaj Interrilatoj" (eldona informo) . . 29

La movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo marŝas en batalo . . . . . . . . . . . . . . . . 30

Petrola urbo en granda progresado . . . . . . . 37


Hiaŭjing kolektas sterkaĵon (bildrakonto) . . . . . 37

Luojang-a Ŝosea Ponto super la Flava Rivero . . . 40

METIARTAĴOJ: Ŝellakaĵo de Fuĝoŭ . . . . . . 43

ĈINAJ NACIECOJ: La aĉang-oj . . . . . . . 45

EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La moderna historio de Ĉinio . . . . . . . . . . . . . 46



30

# Rememoro pri Nia Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ

de la Teoria Grupo de la Ĝenerala Oficejo de
la Ŝtata Konsilantaro

JAM unu jaron forpasis Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, kiu estis intima kunbatalanto de nia granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ Zedong, kaj kore estimata kaj amata de la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj nacioj de nia lando. Depost la morto de Ĉefministro Ĝoŭ, lia brila figuro ĉiam vivas en la koro de la vasta popolo, kaj lia proleta revolucia spirito ĉiam kuraĝigas centmilionojn da niaj popolanoj en ilia antaŭenmarŝado. Post la venko super la kontraŭrevolucia "kvarpersona bando", memore al la unua datreveno de la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ, nia koro ondas malkviete. Ni senlime respektas kaj profunde sopiras Ĉefministron Ĝoŭ.

Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis elita membro de la Komunista Partio de Ĉinio, granda proleta revoluciisto, elstara komunisma batalanto kaj elprovita eminenta gvidanto de la Partio kaj la ŝtato. Li estis lojala al la Partio kaj al la popolo, rezolute plenumis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj sendevie observis la fundamentan principon **"praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn"**. Por plenumi kaj defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, li kuraĝe batalis kontraŭ la malamikoj, timis neniajn malfacilojn kaj danĝerojn kaj ĉiam estis preta oferi sian vivon. Por plenumi kaj defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, li malcedeme batalis kontraŭ oportunismaj kaj reviziismaj linioj, montrante neŝanceleblan starpunkton kaj nekonfuzeblan vidpunkton. Li estis tute malegoisma kaj malkaŝema, ĉiam tenis la ĝeneralajn interesojn en sia koro, kaj estis firma en defendo de la solidareco kaj unueco de la Partio. Gvidate de Prezidanto Maŭ, por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj komunisma afero, li brave batalis, plenkore dediĉis sian



*Ĉefministro Ĝoŭ inter kadroj kaj komunumanoj en la kamparo*

tutan vivon kaj faris senmortajn kontribuojn, kaj pro tio li ĝuis koran amon de la ĉina popolo kaj respekton de la popoloj de la tuta mondo. La estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ estas brila ekzemplo nepre lernenda por la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de nia lando.


### SINCERAJ AMO KAJ RESPEKTO AL PREZIDANTO MAŬ

Nia amata Ĉefministro Ĝoŭ havis ekstreme profundan proletan amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la praktikado de la revolucia batalo li profunde konis, ke Prezidanto Maŭ estas la granda gvidanto de la ĉina popolo, kaj Maŭzedongpenso estas la unika ĝusta doktrino, kiu povas konduki la ĉinan revolucion al venko. En januaro de 1935, kiam la ĉina revolucio alfrontis aborton, en Zunji-konferenco, kiu havis grandan historian signifon, Kamarado Ĝoŭ Enlaj rezolute subtenis Prezidanton Maŭ kaj aprobis lin kiel la gvidanton de nia partio. En 1943, kiam iris la Movado de Ĝustigo de Laborstilo de nia partio, laŭ la sperto de la batalo inter la du linioj en la Partio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj klare montris: "La direkto de Kamarado Maŭ Zedong ja estas tiu de la Komunista Partio de Ĉinio! La linio de Kamarado Maŭ Zedong ja estas tiu de la ĉinaj bolŝevistoj!" En julio de 1949, tuj antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj refoje profunde montris: "Ni devas

danki Prezidanton Maŭ, ke li ĝuste aplikis la universalan veron de Marksismo-Leninismo en la praktikado de la ĉina revolucio, kio havigis al ni grandan forton kaj ebligis al ni venki la potencajn malamikojn de la ĉina revolucio. Ni alvokas ĉiujn lerni de Kamarado Maŭ Zedong kaj kombini la revolucian teorion kun la revolucia praktiko." Dum sia tuta vivo Ĉefministro Ĝoŭ amis Prezidanton Maŭ, diligente studis verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ, firme protektis la gvidadon de Prezidanto Maŭ, defendis lian revolucian linion, admonis la tutlandan popolon studi liajn verkojn kaj propagandadis Maŭzedongpenson. Li ofte studis instrukciojn de Prezidanto Maŭ kune kun kadroj kaj popolanoj kaj persone direktis ilin kanti kantojn *Ruĝas la Oriento* kaj *Marnavigo Dependas de Stiristo* prikantantajn Prezidanton Maŭ.

Por ke Prezidanto Maŭ havu pli da tempo kaj energio por zorgi grandajn internaciajn kaj enlandajn aferojn, resumi sperton en la ĉina revolucio kaj la internacia komunisma movado kaj riĉigi kaj disvolvi la grandan doktrinon de Marksismo-Leninismo, Ĉefministro Ĝoŭ konscience prenis sur sin pezan ĉiutagan laboron de gvidado de la partia, ŝtata kaj milita aferoj, ĉiamaniere malpezigante la ŝarĝon de Prezidanto Maŭ. Li multfoje diris al kamaradoj, kiuj atentigis lin ripozi: "Prezidanto Maŭ estas nia gvidanto kaj devas zorgi grandajn aferojn en- kaj eksterlandajn, tial mi devas fari pli da konkretaj laboroj." Bone sciante ke Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam dormis tre malmulte, Prezidanto Maŭ atentigis siajn laborantojn ĉiufoje kiam li volis venigi lin, ke ili ne veku lin, se li ĵus endormiĝis. Sed Ĉefministro Ĝoŭ rigore diris al siaj laborantoj: "En ĉiu ajn tempo, nur se Prezidanto Maŭ vokas min, vi nepre devas veki min." En 1971 Ĉefministro Ĝoŭ jam estis 73-jara. Foje li laboris senripoze tri diurnojn en la Popola Halo. Tiam iu respondeca kamarado diris al li: "Prezidanto Maŭ diris, ke vi devas bone zorgi vian sanon." Ĉefministro Ĝoŭ respondis: "Ni devas doni pli grandan atenton al la sano de Prezidanto Maŭ."

Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam rigardis la sanon kaj sekurecon de Prezidanto Maŭ kiel la garantion



*Jen estas sunkasko uzita de Ĉefministro Ĝoŭ. En la 28-a de aŭgusto 1945, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ kune flugis de Jan-an al Ĉongking por fari traktadon kun Kuomintango. Antaŭ ekflugo Kamarado Ĝoŭ Enlaj propramane metis ĝin sur la kapon de Prezidanto Maŭ por esprimi al li sian respekton kaj amon.*

de la venko de la revolucia afero de nia partio. En 1945 Prezidanto Maŭ flugis al Ĉongking por trakti kun Kuomintango kaj loĝis tie en la Oficejo de la Okavoja Armeo. Por garantii sekurecon de Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ ne nur aranĝis zorgan gardadon, sed ankaŭ transloĝiĝis en la ĉambron kontraŭan al tiu de Prezidanto Maŭ. Sur iu festeno, kiam multaj proponis tostojn al Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ eltrinkis anstataŭ li, por ke Prezidanto Maŭ evitu probablan insidon de kuomintangaj spionoj. Ekde 1972 Ĉefministro Ĝoŭ suferis gravan malsanon, sed li ankoraŭ montris grandan zorgon pri la sano de Prezidanto Maŭ. Li ellaboris kune kun kuracistoj projekton de kuraco al Prezidanto Maŭ kaj kiam Prezidanto Maŭ estis



*Kamarado Ĝoŭ Enlaj estis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Ŝanhaja Laborista Armita Leviĝo en 1927. Jen la laboristoj de la Komerca Presejo de Ŝanhajo rememoras liajn kontribuojn en la Historia Ekspoza Ĉambro de la presejo.*

ricevanta kuracon, li restadis apude kaj zorgis pri li malgraŭ sia malsano.

En la pasintaj dekoj da jaroj Ĉefministro Ĝoŭ montris sian fidelecon kaj profundan proletan amon al Prezidanto Maŭ en ĉiu tempo kaj en ĉiu ago. Ankaŭ la granda gvidanto Prezidanto Maŭ tre zorgis pri la sano de Ĉefministro Ĝoŭ montrante profundan revolucian amikecon. Post kiam Ĉefministro Ĝoŭ eksuferis gravan malsanon en 1972, Prezidanto Maŭ donis konstantan prizorgon, ofte demandis pri lia malsano kaj plurfoje instrukciis ke oni bone flegu kaj nutru lin, pli multe ripozigu lin kaj malpezigu lian laboron. Antaŭ la Kvara Tutlanda Popola Kongreso en 1975, Prezidanto Maŭ, konsiderante la malsanon de Ĉefministro Ĝoŭ, instrukciis, ke oni preparu plej mallongan raporton pri la laboro de la registaro por ke Ĉefministro Ĝoŭ povu finlegi ĝin seninterrompe. La granda amikeco inter Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ formiĝinta en la longa revolucia batalo estas tre kortuŝa. Ĉefministro Ĝoŭ estis elprovita intima kunbatalanto de Prezidanto Maŭ.

## KURAĜA KAJ FIRMA EN BATALO KONTRAŬ MALAMIKOJ

En la revolucia batalo de dekoj da jaroj, malgraŭ la kruelega blanka teroro, la intensa arma batalo kaj la pinto-kontraŭ-pinta traktado kun malamikoj, nia amata Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam ne zorgis sian personan sekurecon kaj montris sin sagaca, kuraĝa, firma, aplomba kaj plena de fido de la nepra venko.

Zigzaga estas la vojo trapasita de la ĉina revolucio. Kiam la revolucio alfrontis malfacilon, suferis portempan malvenkon kaj falis en danĝeran staton, Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam brave elpaŝis por obstine batali. En 1927 Ĉiang Kajŝek perfidis la revolucion, freneze masakris komunistojn, laboristojn kaj kamparanojn ĵetante la tutan landon en blankan teroron. Por savi la revolucion, kune kun aliaj kamaradoj, Ĉefministro Ĝoŭ kun granda revolucia braveco iniciatis la faman Nanĉang-leviĝon en la unua de aŭgusto de 1927, unuafoje pafis al la reakciuloj de Kuomintango, per tiu arma batalo kritikis la dekstran kapitulacisman linion de Ĉen Duhiu kaj faris gravan kontribuon al la fondo de la granda popola armeo. En januaro de 1935, la Komunista Partio de Ĉinio okazigis en la urbo Zunji la plivastigitan konferencon de la Politika Buroo de KPĈ. Post la kunveno, Ĉefministro Ĝoŭ helpis Prezidanton Maŭ organizi kaj komandi la Ruĝan Armeon en frakaso de la sieĝo kaj persekutado de centmiloj da armeanoj de Ĉiang Kajŝek kaj venke finis la Longan Marŝon de 25,000 lioj.

Ĉefministro Ĝoŭ estis plurfoje sendita de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio al la regionoj de Kuomintango por vid-al-vide trakti kun la malamikoj. Li neniam timis danĝeron nek cedis al potenco, li tute forgesis sian personan sekurecon, brave kaj saĝe venkis la malamikojn kaj bone plenumis la taskon. En decembro de 1936, sub la influo de la politiko de nia partio pri la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto, okazis la Hi-an-a Evento[1]. Tiam la cirkonstanco en Hi-an estis tre komplika kaj danĝera. Kiel plenrajtigito de nia partio, Kamarado Ĝoŭ Enlaj venis al Hi-an, devigis Ĉiang Kajŝek ĉesigi enlandan militon, pace solvis la Hi-an-an Eventon, akcelis la formiĝon kaj disvolviĝon de la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto farante historian kontribuon al la revolucio en la kriza tempo de la ĉina nacio kiu sin trovis inter vivo kaj pereo. Post tio, kiel delegito de la Centra Komitato de la Partio kaj sekretario de la Suda Buroo de CK de KPĈ, Kamarado Ĝoŭ Enlaj longe laboris en Ĉongking, kie funkciis la kuomintanga registaro. Tie li firme observis la principon elmetitan de Prezidanto Maŭ **"persisti en la kontraŭjapana rezistmilito kaj oponi kontraŭ ka-**



*Komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA rememoras la kontribuojn de Kamarado Ĝoŭ Enlaj pri gvido de Nanĉang-leviĝo en la Memordomo de la Nanĉang-leviĝo de la Unua de Aŭgusto.*



*Laboristoj venis al la n-ro 50 de Zenggiajan en Ĉongking, kie laboris Kamarado Ĝoŭ Enlaj, kaj rememoras lian vivon de batalo por la komunisma afero.*

**pitulaco; persisti en unuiĝo kaj oponi kontraŭ splitiĝo; persisti en progreso kaj oponi kontraŭ regreso"** kaj la principon de nia partio en unueca fronto **"sendependeco kaj memdecido"** kaj **"kaj alianci kaj batali".** Malgraŭ la tagnokta gvatado de la kuomintanga polico kaj spurado de spionoj, li ĉiam tenis sin aplombe. Por fortigi nian partion, disvolvi la laboron de la Unueca Fronto, grandigi la progresan forton, altiri neŭtralan forton kaj oponi kontraŭ la obstina forto, li faris tre penigan laboron. En januaro de 1941 Ĉiang Kajŝek perfidis sian promeson kaj sendis multajn trupojn surprizi nian Novan Kvaran Armeon transiĝantan norden por batali kontraŭ la japanaj agresantoj, kaŭzis al la lasta gravan perdon, kaj per tio li estigis la faman Sud-Anhujan Eventon[2] skuantan la tutan mondon kaj levis aliafoje kontraŭkomunistan fluson. Rompinte diversajn blokadojn kaj malhelpojn de kuomintangaj reakciuloj, Ĉefministro Ĝoŭ severe publikigis sur *Hinhua-ĵurnalo* (tiama publika ĵurnalo de nia partio en la regiono de Kuomintango) jenajn du skribaĵojn:

*"Funebro pri la naciaj martiroj en la sudo de Jangzi-rivero".*

*"Senprecedenca maljusteco de jarmiloj*
*Al la Folio[3] sude de l' Rivero.*
*Fratojn mortigas fratoj de la sama domo.*
*Ho ve! kun kia senkoreco kaj kruelo!"*

Li persone iris sur stratojn kune kun siaj laborantoj por disdoni *Hinhua-ĵurnalon* kaj tiel malkaŝis la intrigon de kuomintangaj reakciuloj, kiuj sabotadis en rezisto kontraŭ la japana agreso, sed estis energiaj en opono kontraŭ komunistoj.

En 1946, helpate de la usona imperiismo, Ĉiang Kajŝek ekspedis milionojn da armeanoj por ataki niajn liberigitajn regionojn kaj per tio faris enlandan militon. En la decida milito inter la du sortoj kaj la du estontecoj de la ĉina nacio, nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ, strikte

sekvante la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, kuraĝe batalis, kaj per sia elstara saĝeco en militaj aferoj, helpis Prezidanton Maŭ komandi la Liberigan Militon de la ĉina popolo kaj gajni la grandan venkon de la novdemokratia revolucio.

## OPONO KONTRAŬ KAJ PREVENTO DE REVIZIISMO, PERSISTO EN DAŬRA REVOLUCIO

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, kun la senĉesa progreso de la socialisma revolucio, la burĝaro en kaj ekster la Partio faris foje kaj refoje atakojn kontraŭ nia partio. En 1954, la kontraŭpartia alianco de Gaŭ Gang kaj Ĵaŭ Ŝuŝi intrigis por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. En 1957 dekstruloj de la burĝaro freneze atakis la Partion kaj la socialisman sistemon. En 1959 Peng Dehuaj faris surprizan atakon al la ĝenerala linio de la Partio, la granda impeto kaj la popola komunumo, intencante uzurpi la gvidantecon. Dum la trijara malfacila periodo de la nacia ekonomio (1959-1961), Liu Ŝaŭki energie klopodadis por restaŭri kapitalismon. En 1964, en la Movado de Socialisma Edukado Liu Ŝaŭki elpuŝis burĝan reakcian linion "maldekstran" en formo, sed dekstran en esenco. Vizaĝe al la atako de la burĝaro en kaj ekster la Partio, nia amata Ĉefministro Ĝoŭ sekvis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, staris kiel kolonego subtenanta la ĉielon, firme defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, persistis en opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo kaj daŭrigo de revolucio sub la diktaturo de la proletaro. En 1957, en sia raporta parolado pri la registara laboro ĉe la Kvara Sesio de la Unua Tutlanda Popola Kongreso, Ĉefministro Ĝoŭ elmontris grandajn sukcesojn de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado por refuti la reakcian sofismon de la burĝaj dekstruloj. En decembro de 1964, en la kunveno pri la laboro de la Socialisma Eduka Movado Liu Ŝaŭki kalumniis, ke oni fuŝis ĉion en nia nova socialisma kamparo. Tiam Ĉefministro Ĝoŭ faris raporton pri la laboro de la registaro al la Unua Sesio de la Tria Tutlanda Popola Kongreso en la Popola Halo. En tiu raporto li entuziasme propagandis la fundamentan linion de la Partio kaj la bonan situacion de la lando, akre kontraŭ la reviziisma teorio de Liu Ŝaŭki. Forte kontrastis la du kunvenoj kaj la du linioj.

La Granda Proleta Kultura Revolucio iniciatita kaj gvidita de Prezidanto Maŭ estas granda praktikado de la teorio pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Nia amata Ĉefministro Ĝoŭ fidele plenumis la strategian dispozicion kaj ĉiujn gravajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj multfoje faris malcedemajn batalojn kontraŭ Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj la kontraŭpartia kliko de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, kiuj praktikis reviziismon, splitadon kaj intrigojn kaj subfosadis la Grandan Proletan Kulturan Revolucion.

En la unua periodo de la kultura revolucio Liu Ŝaŭki elmetis la reakcian burĝan linion. Li konfuzis pravon kun malpravo kaj kruele subpremis revoluciajn amasojn. Ĉefministro Ĝoŭ kun plena entuziasmo subtenis la movadon de la Ruĝa Gvardio. Li persone restarigis la reputacion al junuloj de la Ruĝa Gvardio kaj revoluciaj amasoj, kiujn Liu Ŝaŭki kalumniis kiel kontraŭrevoluciulojn. Li iris en bazajn unuojn por legi dazibaŭojn kaj iufoje ĉeestis mitingon malgraŭ pluvo. Dum okfoja revuado de Prezidanto Maŭ al la Ruĝa Gvardio, Ĉefministro Ĝoŭ persone gvidis la laboron pri organizado kaj akceptado de la ruĝgvardianoj, plurfoje faris gravajn paroladojn, propagandis la grandan signifon de la kultura revolucio, alvokis la revoluciajn junulojn kaj vastajn amasojn firme teni la direkton de la batalo, bombardi la burĝan komandejon de Liu Ŝaŭki kaj ĝisfunde kritiki lian kontraŭrevolucian reviziisman linion.

En 1970, en la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio, la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ surprize atakis la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Maŭ, intencante kapti la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Ĉefministro Ĝoŭ faris firman batalon kontraŭ la bando de Lin Biaŭ. En 1971, Lin Biaŭ malsukcesis en sia kontraŭrevolucia puĉo kaj konsternite fuĝis en la 13-a de septembro, perfidante la patrujon kaj intencante sin kroĉi al malamika lando. Laŭ la instrukcio de

Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ, per la braveco kaj saĝeco de proleta revoluciisto, rapide kaj decideme solvis la eventon, defendis Prezidanton Maŭ, la Centran Komitaton de la Partio estratan de Prezidanto Maŭ kaj la diktaturon de la proletaro.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, ĉu la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ aŭ la kontraŭpartia kliko de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, ili senescepte klopodis por "faligi ĉiujn", incitis "plenampleksan internan militon", freneze persekutis revoluciajn kadrojn, subagitis amasojn batali unuj kontraŭ aliaj, estigis perfortan batalon, oponis kontraŭ la gvido de la Partio kaj estigis ĥaoson en la armeo, subfosis la revolucion kaj produktadon. Ĉefministro Ĝoŭ firme kredis, ke plejparto de la kadroj estas bonaj kaj kompare bonaj. Rilate al kadroj farintaj erarojn li observis la principojn de Prezidanto Maŭ, nome **"plivastigi la amplekson de eduko kaj redukti tiun de atakado"** kaj **"lerni el pasintaj eraroj por eviti estontajn, kuraci la malsanon por savi la homon"**, pacience helpis ilin en korektado de iliaj eraroj kaj kuraĝigis ilin daŭre revolucii. Li protektis per diversaj rimedoj la bonajn kadrojn, kiuj estis persekutataj de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando". Li ripetade edukis gvidajn kadrojn, ke ili ĝuste sin tenu al la Granda Proleta Kultura Revolucio, al la amasoj kaj si mem. Li varme prizorgis kaj edukis junajn kadrojn kaj kuraĝigis ilin sin hardi en ŝtormo de la revolucia batalo. Por fondi revoluciajn komitatojn de triflanka kombiniĝo, li senripoze, ĉu en tago aŭ en nokto, akceptis reprezentantojn de amasaj organizoj de diversaj lokoj, pacience persvadis ilin forigi la burĝan sektismon. Pro peno liaj okuloj ruĝiĝis, lia korpo malgrasiĝis, kaj liaj haroj griziĝis. Ja grandegan energion nia bona Ĉefministro Ĝoŭ elverŝis sur la Grandan Proletan Kulturan Revolucion por ke ĝi donu abundajn fruktojn.

Ĉefministro Ĝoŭ fidele observis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri profunda konduko de socialisma revolucio en superstrukturo kaj varme subtenis novajn socialismajn aferojn. Por ke la proleta revolucia afero komencita de maljunaj revoluciuloj en Ĉinio havu daŭrigantojn, li tre atentis elekton kaj kulturon de junaj kadroj. Li firme observis la principon pri kombiniĝo de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj, entuziasme prizorgis kaj subtenis novan forton aperintan en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĉefministro Ĝoŭ donis grandan atenton al la eduka revolucio. En 1961, kiam la Komunisma



*Jen la ĉambro loĝita de Kamarado Ĝoŭ Enlaj dum Zunji-konferenco*

*Jen Hinhua-jurnalo de januaro, 1941, kun skribaĵoj de Kamarado Ĝoŭ Enlaj*




Labora Universitato de Gianghi estis subfosita de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, li diris al gvidantoj de la universitato kaj reprezentantoj de ĝiaj studentoj: "La fondo de novtipa lernejo estas granda revolucio en la historio de edukado kaj en la afero ne povas ne esti batalo. Se ni renkontos batalon, tio estas nestranga; se la afero iros glate sen batalo, tio estas stranga." Li kuraĝigis ilin senŝanceliĝe plenumi la instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj bone fari la laboron de la lernejo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio Ĉefministro Ĝoŭ plurfoje akcentis la gravecon de eduka revolucio montrante: "La eduka reformo estas tre grava ĉenero en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Kulturi kaj eduki posteulojn estas granda afero por estontaj centoj da jaroj kaj ne devas esti neglektita." Ĉefministro Ĝoŭ tre zorgis revolucion en literaturo kaj arto. Li ofte atentigis la literaturistojn kaj artistojn, ke ili serioze studu la verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an,* persistu en direkto de servado al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj plenumu la principon **"kune floru cent floroj, elŝovu novon el malnovo".** En 1965 li varme akceptis membrojn de la Ulanmuĉi-a Arta Propaganda Trupo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kiuj faris prezentadon tra la tuta lando, kaj kuraĝigis ilin: "Vi jam iris tra la tuta lando kaj ekbruligis la artan fajron de Maŭzedongpenso. Poste vi ankoraŭ devas reveni al la stepo por daŭre servi al tieaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj." Li persone direktis la kreadon kaj ekzercadon de la epopeo de muziko kaj danco *Ruĝas la Oriento.* Li plurfoje rigardis modernajn revoluciajn teatraĵojn kaj filmojn, donante instrukciojn kaj eĉ revizion. Ĉefministro Ĝoŭ tre atentis pri higiena revolucio. Por efektivigi serion da instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri higiena laboro, li multfoje instrukciis al la departementoj de higiena laboro, ke oni "turnu sin al la kamparo, al la amasoj", "solvu la problemon de kuraco kaj preventado de malsano de la sepcent milionoj da kamparanoj", ke oni bone faru la laboron de koopera kuraco, bone kombinu la ĉinan medicinon kun la okcidenta por krei novan unuecan medicinon kaj farmacion de Ĉinio. Li varme kuraĝigis me-

dicinajn laborantojn de urboj iri al la kamparo, instrukciis al medicinaj departementoj ke ili sendu medicinajn taĉmentojn al foraj regionoj kaj regionoj de nacimalplimultoj. Li akceptis la kuracistojn, kiuj estis irontaj al Tibeto, Junnan kaj Gansu (provincoj tre foraj de Pekino). Li tre zorgis pri kreskado de "nudpiedaj" kuracistoj kaj foje li interparolis 8 horojn kun iliaj reprezentantoj kaj kuraĝigis ilin bone servi al la popolo. Ĉefministro Ĝoŭ tre zorgis pri revolucio en scienca kaj teknika fronto. En 1956, dank' al lia kora prizorgo, oni ellaboris perspektivan planon de disvolvo de scienco kaj tekniko de nia lando, kiu ludis gravan rolon en ŝanĝo de la postiĝinteco de scienco kaj tekniko de nia lando, kaj en la konformigo de scienca kaj teknika esplorado al la progreso de la nacia ekonomio. Li plurfoje emfazis, ke scienca esplorado devas kombini sin kun produktado kaj aplikado, ke oni devas disvolvi aplikatajn sciencojn kaj samtempe atenti pri bazaj teorioj, kaj nur tiamaniere nia lando povos atingi kaj superi la progresintan nivelon de la mondo. La plej moderna tekniko de nia lando disvolviĝis senĉese kaj rapide ĝuste sub la persona direktado de Ĉefministro Ĝoŭ. Pri la sporta laboro, Ĉefministro Ĝoŭ instrukciis, ke oni nepre devas persiste meti la proletan politikon sur la komandan lokon, persiste kombini sportan aktivadon kun produktado, kun nacidefenda konstruado kaj kun higieno, ke oni devas doni grandan atenton al disvolvo de amasa sporta aktivado, fortigi la ideologian reformadon de sportistoj kaj oponi kontraŭ la pure teknika vidpunkto kaj ĉampionismo kaj burĝa stilo en sportado. Laŭ la penso de Prezidanto Maŭ li elmetis la sloganon "unue amikeco, due konkurso", kiu ne nur fariĝis gvida penso de sporta maĉo de nia lando, sed ankaŭ havis gravan influon al la internacia sporta rondo kaj ludis aktivan rolon en plifortigo de amikeco inter la sportistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam donis grandan atenton al gajno, eduko kaj reformo de intelektuloj. Li ofte edukis kaj kuraĝigis intelektulojn iri la vojon de kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj kaj konscience servi al socialismo sub la gvido de la Partio. En 1956, en la kunveno okazigita de la Centra Komitato de KPĈ pri la problemo de intelektuloj, Ĉefministro Ĝoŭ faris gravan paroladon, kiu ludis gravan rolon en puŝado de ideologia reformado de intelektuloj kaj en altigo de ilia socialisma aktiveco. Ĉefministro Ĝoŭ rigardis la kamparaniĝon de intelektaj gejunuloj kiel strategian rimedon por kulturi daŭrigantojn de la proleta revolucia afero, konstrui la novan socialisman kamparon kaj redukti la tri grandajn diferencojn inter laboristoj kaj kamparanoj, inter urbo kaj kamparo kaj inter fizika kaj mensa laboroj. Li persone okazigis diversajn kunsidojn de intelektaj gejunuloj por aŭskulti iliajn opiniojn kaj helpi ilin en solvo de malfaciloj.

## LABORI TAGE KAJ NOKTE POR KONSTRUI POTENCAN SOCIALISMAN LANDON

Post la fondo de la nova Ĉinio, por ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de nia lando kaj konstrui nian landon en potencan socialisman landon, nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ ĉiutage faris grandan kvanton da laboroj pene klopodante.


La granda gvidanto Prezidanto Maŭ ellaboris por la socialisma konstruado de nia lando la marksisman-leninisman linion kaj kompleton da principoj kaj politikoj. Por efektivigi la linion, principojn kaj politikojn de Prezidanto Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ faris tre zorgeman planadon kaj grandan laboron de organizado. Ĉiuj kvinjaraj planoj de disvolviĝo de la nacia ekonomio post la fondo de la nova Ĉinio estis ellaboritaj kaj efektivigitaj sub la persona prezido kaj organizado de Ĉefministro Ĝoŭ. Ĉu la bazaj taskoj de ĉiuj planoj, aŭ la rapideco de disvolvo de produktado, ĉu la skaloj de baza konstruado aŭ la ĉefaj konstruaj temoj, ĉiuj estis atenteme studitaj kaj sankciitaj de Ĉefministro Ĝoŭ. En la Unua Kvinjara Plano, observante la ĝeneralan linion de la Partio en la transira periodo, oni fundamente finis la socialisman reformadon al posedsistemo de produktaj rimedoj de agrikulturo, metiindustrio kaj kapitalismaj industrio kaj komerco kaj finplenumis nombron da gravaj konstruoj kun grava signifo por la nacia ekonomio, per kiuj fundamentiĝis nia socialisma industriigo. La Dua Kvinjara Plano estis antaŭdate

plenumita dank' al praktiko de la penso de Prezidanto Maŭ en la verko *Pri Dek Gravaj Interrilatoj* kaj kuna klopodo de la tutlanda popolo. En la trijara malfacila periodo de la nacia ekonomio, Ĉefministro Ĝoŭ ellaboris la principon "reguligo, firmigo, perfektigo kaj altigo", direktis la tutlandan popolon por venki la subfosadon de la sovetuniaj reviziistoj, la ĝenadon de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj malfacilon kaŭzitan de la naturaj katastrofoj, tiel ke la industrio kaj agrikulturo rapide restariĝis kaj disvolviĝis. En la Tria kaj Kvara Kvinjaraj Planoj, samtempe kun la daŭra disvolvo de industrio en la apudmaraj regionoj oni akcentis la disvolvon de la industrio de la internaj regionoj, tiel ke la pozicioj de industriaj entreprenoj multe raciiĝis, kio utilas al la preparado kontraŭ eventuala agreso kaj la ekvilibra disvolvo de la nacia ekonomio. En la lastaj pli ol dudek jaroj, la ĝenerala linio de la socialisma konstruado, la ĝenerala principo por disvolvo de la nacia ekonomio **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron"** kaj la strategia penso **"sin prepari kontraŭ milito, sin prepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo"** elmetitaj de Prezidanto Maŭ ĉiuj estis iom post iom plenumitaj en la ŝtata planado kaj aktuala laboro sub la rekta prezido kaj gvido de Ĉefministro Ĝoŭ.

En la socialisma konstruado Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam persiste prenis klasbatalon kiel la ĉefĉenero, kaj ĉiuflanke plenumis la principon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion, stimuli la produktadon"**. Li aktive antaŭenpuŝis la socialisman revolucion en la superstrukturo kaj ekonomia bazo, movis kaj stimulis produkton per revolucio, kaj oponis kontraŭ la erara tendenco ne teni klasbatalon, nek persisti en irado de la socialisma vojo. En 1958 kaj 1970, li direktis la laboron pri transdono de administra rajto de entreprenoj sub la Centra Registaro al lokaj registaroj kaj la reformadon de sistemo de ekonomia administrado, donante grandan atenton al altigo de aktiveco de la centra aŭtoritato kaj diversaj lokoj. Samtempe li entuziasme akcelis la progreson de industrio kaj agrikulturo, serioze solvante gravajn problemojn en konkretaj laboroj. Li multfoje refutis la metafizikajn vidpunktojn de la kontraŭpartia kliko de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" kaj iliajn diversajn kontraŭmarksismajn teoriojn pri la rilatoj inter politiko kaj profesia laboro kaj inter revolucio kaj produkto, persistante en dialektika materiisma vidpunkto de unueco kaj kontraŭstaro inter politiko kaj profesia laboro kaj tiuj inter revolucio kaj produkto.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"sendependeco, memdecido, sinapogo sur propraj**

*Lej Ĝifu, la partifilia sekretario de Zaŭjuanbrigado de Jan-an, rakontas heroajon de Ĉefministro Ĝoŭ al junuloj antaŭ la domo kie li iam loĝis.*



fortoj", Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam akcentis fari amasan movadon, iri nian propran vojon en disvolvo de industrio, agrikulturo, sciencoj kaj tekniko. La du ruĝaj flagoj de Daking kaj Daĝaj persone starigitaj de Prezidanto Maŭ reprezentas la direkton de la disvolviĝo de la socialisma industrio kaj socialisma agrikulturo de nia lando. Ĉefministro Ĝoŭ entuziasme subtenis kaj protektis la du ruĝajn flagojn kaj antaŭen puŝis la amasan movadon de lerno de Daking kaj Daĝaj. Li trifoje inspektis Daking kaj alte taksis Daking, ke ĝi plenamplekse plenumis la "Ĉarton de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio"[4], enkorpigis spiriton de la ĝenerala linio konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie; ke ĝi estas modelo en lerno kaj apliko de Maŭzedongpenso kaj en lerno de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Resumante la sperton de Daking, Ĉefministro Ĝoŭ aprobis la direkton "kombini industrion kun agrikulturo, kombini urbon kun kamparo, por favorigi produktadon kaj faciligi la vivon" kaj la organizan formon de unueco de registara kaj entreprena administrado, kaj montris, ke tio havas gravan signifon por redukti kaj iom post iom elimini la tri grandajn diferencojn. En la kultura revolucio, la "kvarpersona bando" plurfoje intencis forhaki la ruĝan flagon de Daking, sed Ĉefministro Ĝoŭ kuraĝigis la laboristojn de Daking persisti en la spirito de fondado de la entrepreno per la du verkoj de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *Pri Kontraŭdiro* kaj ĉiam teni alte la ruĝan flagon. Ĉefministro Ĝoŭ trifoje iris al Daĝaj por resumi la sperton. Li montris: "Persiste metu la proletan politikon kaj Maŭzedongpenson en la komandan lokon, persistu en la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj, persistu en la komunisma moralo ami la ŝtaton kaj la kolektivon." Tio ja estas la baza sperto de Daĝaj. En 1964 Liu Ŝaŭki intencis forhaki la ruĝan flagon de Daĝaj, kaj tiam Ĉefministro Ĝoŭ sendis tien laborgrupon por subteni Daĝaj, donante grandan kuraĝigon al tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Ĉefministro Ĝoŭ firme plenumis la politikojn de Prezidanto Maŭ pri nacimalplimultoj. Li tre zorgis pri la kulturado de kadroj devenantaj de nacimalplimultoj kaj pri disvolvo de ekonomio kaj kulturo de nacimalplimultaj regionoj kaj en tio li faris multajn instrukciojn. Li ofte atentigis la kadrojn de han-nacieco, ke ili preventu kaj korektu ŝovinismon de granda han-nacieco.

Li rezolute plenumis la politikon de Prezidanto Maŭ pri la unueca fronto kaj faris grandan laboron por disvolvi la revolucian unuecan fronton gvidatan de laborista klaso, bazitan sur la alianco de laboristoj kaj kamparanoj kaj inkluzivantan patriotajn demokratiajn partiojn kaj grupojn, patriotajn personojn, patriotajn ĉinajn elmigrintojn kaj samlandanojn en Hongkongo kaj Aŭmen, por unuigi ĉiujn unuigeblajn fortojn kaj konstrui socialismon. Li ofte persone eksplikis la politikojn de nia partio kaj la situacion en kaj ekster la lando al la patriotaj partioj kaj personoj de diversaj rondoj, interkonsiliĝis kun ili pri la gravaj problemoj en la politika vivo de Ĉinio, pacience helpis ilin en ilia ideologia reformado, kondukis ilin sur la socialisman vojon kaj al akceptado de la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj kuraĝigis ilin kontribui al la konstruado de la potenca socialisma patrujo.

Ĉefministro Ĝoŭ senlace laboradis tage kaj nokte por konstrui nian patrion. Ĉu en fabrikoj kaj kamparo, aŭ sur multaj gravaj konstruejoj, ĉie restis la spuro de nia amata Ĉefministro Ĝoŭ. La ordigo de grandaj riveroj de nia lando, la konstruado de ĉiuj gravaj fervojoj, la konstruado de ĉiuj gravaj entreprenoj, la sukcesa eksplodigo de atombomboj kaj hidrogenbomboj kaj lanĉo de arte faritaj satelitoj, en ĉio ĉi tio kristaliĝis la klopodado de nia Ĉefministro Ĝoŭ. En la lastaj pli ol 20 jaroj, precipe en la Granda Proleta Kultura Revolucio, dank' al la penema luktado de la tuta popolo, nia lando sin liberigis de la stato de malriĉeco kaj postiĝinteco kaj atingis fundamentan prosperon. En la komenco de 1975, Ĉefministro Ĝoŭ, en grava malsano, faris al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso raporton pri la laboro de la registaro. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ li alvokis al la tuta popolo: En la kuranta jarcento plenamplekse efektivigu la modernigon de agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko, por ke nia nacia ekonomio povu iri inter la antaŭajn

vicojn de la mondo, kaj Ĉinio povu esti konstruita en potencan modernan socialisman landon. La impona plano esprimis la deziron de la popolo de la tuta lando kaj ni nepre devas klopodi por efektivigi ĝin.

## SUBTENI LA MONDAN REVOLUCION, OPONI KONTRAŬ LA DU HEGEMONIAJ POTENCOJ

Observante la revoluciajn diplomatiajn linion kaj politikojn de Prezidanto Maŭ, en la internaciaj aferoj Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam persistis en la proleta internaciismo, klopodis por firmigi nian unuiĝon kun la proletaro, subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo, kaj kun la ŝtatoj minacataj de agreso, ŝtatrenverso, interveno, superregado kaj ofendo de imperiismo, starigi la plej vastan unuecan fronton kaj oponi kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismo, precipe la hegemonio de la du superpotencoj Sovetunio kaj Usono. Liu Ŝaŭki, Lin Biaŭ kaj la kontraŭpartia "kvarpersona bando" ĉiamaniere ŝovis sian nazon en la diplomatiajn aferojn, ĝenadis kaj subfosadis la revolucian diplomatian linion de Prezidanto Maŭ; kaj Ĉefministro Ĝoŭ faris firman batalon kontraŭ ili. Direktate de Marksismo-Leninismo-Maŭzedong-penso, li partoprenis en ellaborado de gravaj politikoj de diplomatiaj aferoj kaj persone plenumis ilin. Li elmetis serion da konkretaj principoj kaj politikoj en diplomatiaj aktivadoj, kreive plenumis la revolucian diplomatian linion de Prezidanto Maŭ, kulturis grandan nombron da proletaj diplomatiaj laborantoj, kreis kaj disvolvis stilon de diplomatiaj aferoj de la nova Ĉinio.

En diplomatiaj laboroj Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam donis grandan atenton al la popolo kaj metis sur ilin esperon. Li akceptis fremdlandajn gastojn de ŝtataj gvidantoj ĝis ne-registaraj personoj kaj prezidis multajn diplomatiajn traktadojn. Li vizitis multajn landojn de Azio, Afriko kaj Eŭropo kaj ĉeestis gravajn internaciajn konferencojn. La famaj Kvin Principoj de Paca Kunekzistado iniciatitaj de li en la nomo de nia lando akiris brilan venkon en la Bandunga Konferenco kaj estas bonaj kriterioj por amika kunlaboro inter landoj. La ok principoj de nia ekstera helpo, kiujn li proklamis dum la vizitado al la afrikaj landoj estas tre bonvenaj al kaj laŭdataj de la landoj de la tria mondo. Dank' al la prizorgo kaj direkto de Ĉefministro Ĝoŭ, laŭ la principo de egalrajteco kaj reciproka favoro, nia lando disvolvis komercadon kun diversaj landoj kaj donis laŭeblan helpon al frataj socialismaj landoj kaj disvolviĝantaj landoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"neniam ĉasu hegemonion"**, Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam pledis por egaleco de ĉiuj landoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, kaj edukis diplomatiajn laborantojn, la vastan kadraron kaj la amasojn, ke ili modeste lernu bonajn punktojn de diverslandaj popoloj kaj firme, ĝisfunde kaj komplete eliminu la grandlandan ŝovinismon en internaciaj kontaktoj.

En la internacia aktivado Ĉefministro Ĝoŭ rezolute oponis kontraŭ la milita politiko kaj agresa politiko de la du hegemoniaj potencoj Sovetunio kaj Usono, ĉiam simpatiis kaj subtenis la kontraŭimperiisman kaj kontraŭhegemonian batalon de la landoj kaj nacioj agresataj kaj subpremataj de la du superpotencoj. Kiam la popoloj de Koreio, Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso estis agresataj de la usonaj imperiistoj, Ĉefministro Ĝoŭ faris senlacan klopodadon por helpi ilian kontraŭusonan nacisavan batalon. Kiam la social-imperiisma Sovetunio subpremis, blokadis kaj batis Albanion kaj ekspedis trupojn en Ĉeĥoslovakion, kiam Sovetunio kaj Usono subfosadis la naciliberigan movadon de Palestino kaj intense konkuris por kapti Mez-Orienton, kiam la movado de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko por ŝtata sendependeco kaj nacia liberiĝo suferis subpremadon de imperiismo kaj nova kaj malnova koloniismo, Ĉefministro Ĝoŭ, en la nomo de la registaro kaj popolo de nia lando, ĉiam ĝustatempe donadis fortan subtenon kaj helpon al la popoloj de tiuj landoj kaj regionoj.

En la internacia komunisma movado, Ĉefministro Ĝoŭ meritas la nomojn de granda proleta internaciisto kaj obstina kontraŭreviziisma batalanto. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ li unuiĝis kun la marksismaj partioj kaj organizoj de diversaj landoj kaj subtenis ilin, kaj faris malcedeman batalon kontraŭ la Ĥruŝĉova-

Brejneva renegata kliko, dank' al kio multe disvolviĝis la internacia komunisma movado. En la 22-a Kongreso de la Sovetunia Komunista Partio en 1961, Ĉefministro Ĝoŭ severe malkaŝis kaj kritikis la kriman agon de la Ĥruŝĉova renegata kliko, kiu publike oponis kontraŭ la frata partio kaj splitis la internacian komunisman movadon, forte kuraĝigis la internacian proletaron kaj subpremis arogantecon de la moderna reviziismo. Antaŭ la fino de la kongreso Ĉefministro Ĝoŭ reflugis al la patrio kaj lin bonvenigis nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ sur la aerodromo.

## ĈIAM KONSERVI KAJ DISVOLVI LA BONAN STILON DE LA PARTIO

Edukate de Prezidanto Maŭ Zedong, la Komunista Partio de Ĉinio formis en la longdaŭra revolucia batalado la bonan laborstilon de kombiniĝo de teorio kun praktiko, intima interligiĝo kun la popolamasoj kaj apliko de kritiko kaj memkritiko. Tiu ĉi laborstilo komplete montriĝis en la agoj de Ĉefministro Ĝoŭ. Li ĉiam rigardis konservon kaj disvolvon de la bona laborstilo de la Partio kiel garantion por efektivigi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj protekti la proletan karakteron de la Partio.

Ĉefministro Ĝoŭ konstante persistis en kombiniĝo de teorio kun praktiko. Dum dekoj da jaroj, elirante el la bezonoj de la revolucia batalo li diligente studis la verkojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Prezidanto Maŭ kaj ĝuste analizis kaj solvis diversajn konkretajn problemojn per marksismaj starpunkto, vidpunkto kaj metodo. En traktado de problemoj li persistis en la linio kaj politikoj de la Partio, rigore observis materiismon, donis grandan atenton al enketado kaj studado kaj persone kunvokis kunsidojn por enketado. Precipe kiam li devis solvi gravajn kaj komplikajn problemojn, li ĉiam klopodis por kiel eble plej komplete konadi ĉiuflankajn statojn kaj aŭskulti diversajn opiniojn kaj faris decidojn post ripetadaj analizoj kaj komparoj. Profitante akceptadon de kadroj kaj amasoj de diversaj lokoj, li ofte informiĝis de ili pri cirkonstancoj kaj lernis de la amasoj kaj de kamaradoj de diversaj lokoj. Li estis lerta koncentri la saĝon de kadroj kaj popolanoj, resumi ilian praktikan sperton kaj elmeti konkretajn orientilojn kaj principojn por antaŭenpuŝi la laborojn de diversaj profesioj kaj entreprenoj laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Dank' al la diligenta studado de la revolucia teorio kaj persona partopreno en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado en la longdaŭra revolucia batalo, li akiris tre multajn sciojn kaj akumulis riĉan sperton. Li estis lerta en kapto de la esenco de problemoj kaj en perfekta solvo de diversaj komplikaj problemoj.

Ĉefministro Ĝoŭ estis ekstreme respondecema pri sia laboro. Dum dekoj da jaroj li laboris diligente, serioze kaj sinforgese. Li ofte laboris ĝis tagiĝo. Laciĝinte li stariĝis por iom promeni. Kiam li sentis sin dormema li viŝis sian vizaĝon per malseka lavtuko. Ne havante tempon por manĝi, li do manĝis iom da kukoj en aŭtomobilo. Kiam kamaradoj admonis lin al ripozo, li diris: "Mi jam maljuniĝis kaj devas pli multe labori!" Dum la festotago kaj ferioj li estis okupata de pli multa laboro. Dum sia malsano li ankoraŭ persistis en laborado, legis grandan kvanton da dokumentoj, faris instrukciojn kaj solvis diversajn problemojn, ofte intervidiĝis kun fremdlandaj amikoj kaj faris longajn interparoladojn kun ili. Nelonge antaŭ sia forpaso li petis aliajn rakonti al li pri la kurantaj aferoj en kaj ekster la lando. Li diris: "Mi ankoraŭ povas aŭskulti kaj mia cerbo ankoraŭ laboras." Ĉefministro Ĝoŭ ĝuste tiel batalis ĝis sia lasta spiro por la Partio kaj la revolucio.

Ĉefministro Ĝoŭ tenis intiman interligiĝon kun la popolamasoj kaj ĉiumomente zorgis pri iliaj lernado, laboro kaj vivo. Kie okazis grava katastrofo kaj la popolamasoj suferis de malfacil oj, tien Ĉefministro Ĝoŭ sendis ĝustatempe prizorgon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. La sekvantan tagon post la forta tertremo en Hintaj-regiono de Hebej-provinco en 1966, Ĉefministro Ĝoŭ rapidis tien por konsoli la popolon kaj gvidi la kontraŭtertreman kaj helpan laboron, malgraŭ la minaco de posttertremoj. Li ĝustatempe resumis la sperton kaj lecionojn de la kontraŭtertrema kaj helpa laboro, instrukciis, ke la koncernaj departementoj tuj organizu la laboron de prognozado pri

tertremo, kaj elmetis la principon "bone fari la prognozadon pri tertremo sub la unueca gvido de la Partio, preni antaŭpreparon kiel la ĉefan metodon, kombini la profesiajn laborantojn kun la amasoj, kombini simplajn metodojn kun modernaj kaj sinapogi sur la vastaj amasoj". En 1970, kiam Ĉefministro Ĝoŭ informiĝis ke la vivo de la popolanoj de iuj lokoj en norda Ŝenhi-provinco ankoraŭ estis kompare malfacila, li diris kun peza koro: "La popolo de norda Ŝenhi-provinco vivtenis nin. Jam forpasis pli ol dudek jaroj post la Liberiĝo de nia lando, tamen la vivo de iuj lokoj ankoraŭ estas tiel malfacila. Mia koro tre afliktiĝas pro tio." Li persone prezidis kunvenojn kaj instrukciis al la Partia Komitato de Ŝenhi-provinco kaj la diversnivelaj partiaj komitatoj de Jan-an-regiono, ke ili organizu la vastajn amasojn de kadroj kaj popolanoj al studado de la "Responda Telegramo" de Prezidanto Maŭ al la Jan-an-a popolo en 1949, faru planojn kaj mobilizu amasojn por ŝanĝi la fizionomion de norda Ŝenhi. Li ankaŭ instrukciis, ke Pekino helpu ilin en konstruado de fabrikoj subtenantaj agrikulturon. Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam tenis la amasojn en sia koro. Li tre zorgis pri la prevento kaj kuraco de ripetemaj, oftaj, profesiaj kaj lokaj malsanoj serioze minacantaj la popolon kaj multfoje instrukciis, ke higienaj fakoj esploru kaj solvu tion. Estante gvidanto de la Partio kaj la ŝtato Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam agis kiel ordinara laborulo. Li sin tenis varmkora al kamaradoj kaj la popolo, kaj traktis ĉiujn egale, ĉu ili estas gvidantaj kadroj aŭ ordinaraj laboristoj kaj kamparanoj. Dum enketado kaj studado en fabrikoj, vilaĝoj kaj bazaj unuoj, Ĉefministro Ĝoŭ ofte laboris, manĝis kune kun la amasoj kaj intime interparolis kun ili. Kiam la gardostarantoj tenis sian movon plenan de respekto dum lia promenado, li manpremis kun ili kaj intime diris: "Ni ĉiuj estas kamaradoj, ni ne bezonas tian formalaĵon."

Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam rigore postulis de si mem, kondutis modeste kaj diskrete kaj vivis malluksege kiel en la malfacilaj kaj penigaj militaj jaroj, tiel en la jaroj post la venko. Li ofte stimulis sin mem kaj admonis aliajn per jenaj vortoj: "Lernu kaj remuldu sin dum la tuta vivo." Li estis malkaŝema, kuraĝis fari memkritikon kaj ofte edukis la kadrojn kaj la amasojn per sia historia sperto. Li diris: "Ni devas paroli pri niaj eraroj al ĉiuj konatoj, kaj nur tiel ni povas ricevi atentigon kaj helpon de kamaradoj kaj averti aliajn ne fari similajn erarojn." Ĉefministro Ĝoŭ restis modesta, diligenta kaj ŝparema en sia vivado kaj tutkore dediĉis sin al publika intereso. Post la fondiĝo de la Respubliko, iuj kamaradoj proponis konstrui domegon por la Centra Registaro kaj eĉ pretigis modelon. Ĉefministro Ĝoŭ firme oponis kontraŭ tio dirante: "Ni nepre devas plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri peniga kaj ŝparema konstruado de la lando. Dum mi servas kiel ĉefministro, mi ne konsentas konstrui tian domegon." Laŭ la peto de la amasoj, la Partia Komitato de Huaj-an-gubernio, kie Ĉefministro Ĝoŭ naskiĝis, multfoje proponis ripari lian malnovan loĝejon. Sed li firme oponis kontraŭ tio respondante al la gubernia partia komitato: Unue, estas malpermesate viziti ĝin; due, estas malpermesate transloĝigi la loĝantojn el la domoj; trie, estas malpermesate ripari ĝin malgraŭ ĝia kadukiĝo. Ĉefministro Ĝoŭ tre rigore traktadis siajn parencojn. Iu el liaj parencoj laboris en Pekino kaj lia edzino estas aliloke. Por ke ili vivu kune, la supera instanco transpostenigis ŝin al Pekino. Informiĝinte pri tio, Ĉefministro Ĝoŭ diris: "Kial oni devas nur venigi ŝin al Pekino, sed ne sendi lin tiuloken por ke la geedzoj vivu kune?" Persvadite de Ĉefministro Ĝoŭ ili ambaŭ ĝoje iris labori en tiu loko.

## "NI GRUPIĜU EN ROND', KAJ LA INTERNACIO TRIUMFU EN TUTMOND'"

Nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam tenis en sia koro la okcent milionojn da popolanoj, fruan liberigon de Tajvan-provinco por unuigi la patrion, la venkon de la ĉina revolucio kaj la monda revolucio kaj la venkon de komunismo. En la lastaj tagoj de la vivo, li multfoje mallaŭte kantis: "Ni grupiĝu en rond', kaj la internacio triumfu en tutmond'." Tio profunde pruvis lian firman kredon je la nepra venko de la komunisma afero. Frue antaŭ dek kelkaj jaroj, Ĉefministro Ĝoŭ kaj Kamaradino Deng Jingĉaŭ jam interkonsentis, ke post ilia forpaso la cindro ne estu konservata. Ili opiniis, ke la ŝanĝiĝo de

enterigo al kremacio estas revolucio, kaj ankaŭ la ŝanĝiĝo de konservo de cindro al nekonservo estas revolucio. Ĉefministro Ĝoŭ testamentis, ke oni disŝutu lian cindron en la riverojn kaj sur la teron de la patrio. Lia peto estas sankciita de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio post lia forpaso. La revolucia iniciato de Ĉefministro Ĝoŭ pri trakto de sia cindro plene montris lian komunisman spiriton de ĝisfunda rompo kun malnovaj tradiciaj konceptoj.

La tuta vivo de Ĉefministro Ĝoŭ estas brila vivo de batalo por la komunisma afero, kaj vivo de persisto en daŭrigo de la revolucio. Por gajni la venkon de la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero, Ĉefministro Ĝoŭ batalis obstine, senegoisme kaj brave en pli ol 50 jaroj. La granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ estas nedisigebla de la braveco, saĝo kaj klopodado de Ĉefministro Ĝoŭ. La ĉina popolo estas fiera kaj feliĉa pro tio ke ĝi havis la grandan gvidanton kaj instruiston Prezidanton Maŭ kaj lian intiman kunbatalanton Ĉefministron Ĝoŭ. Kun la reakcia klasa naturo, la "kvarpersona bando", fatala por la nacio kaj popolo, ekstreme malamis Ĉefministron Ĝoŭ. Ili ĉiamaniere kalumniis kaj persekutis Ĉefministron Ĝoŭ, senĉese ĝenadis lin por tute lacigi lin kaj elĉerpi lian energion. Kial la "kvarpersona bando" tiel senkore kaj freneze oponis kontraŭ nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ? Ĝuste kiel Prezidanto Hua montris: "Ili celis uzurpi la plej altan gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato post faligo de Ĉefministro Ĝoŭ." La vastaj popolamasoj antaŭlonge jam travidis la kontraŭrevolucian intrigon de la "kvarpersona bando" kaj malamegis ilin en la koro. Post la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ, la tutlanda popolo ekstreme malĝojis pro la perdo de sia eminenta ĉefministro kaj okazigis diversajn funebrajn aktivadojn por esprimi siajn malĝojegon kaj sopiron al li. Tion kaj timis kaj malamis la "kvarpersona bando" kaj freneze subfosadis kaj subpremadis. Ili intencis forigi la brilan figuron de Ĉefministro Ĝoŭ kaj nei liajn grandiozajn kontribuojn. La krimego de la "kvarpersona bando" incitis ĉe la popolamasoj nur senkomparan malamon kontraŭ ili kaj pli fortan sopiron al Ĉefministro Ĝoŭ.

Ĉefministro Ĝoŭ forpasis, sed lia brila figuro ĉiam konserviĝos en la koro de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la mondo. Lia revolucia spirito ĉiam brilos kiel la suno kaj la luno, kaj liaj grandiozaj kontribuoj estas senmortaj.

---

*1. Influate de la Ĉina Ruĝa Armeo kaj la kontraŭjapana movado de la popolo, la kuomintanga Nordorienta Armeo estrata de Ĝang Hjueliang kaj la kuomintanga 17-a-voja Armeo estrata de Jang Huĉeng konsentis pri la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto elmetita de la Komunista Partio de Ĉinio kaj postulis, ke Ĉiang Kajŝek kunligiĝu kun la Komunista Partio por rezisti kontraŭ Japanio. Ĉiang Kajŝek rifuzis la postulon, kaj eĉ pli malice agis, aktive preparis militan agadon de "ekstermo al komunistoj" kaj masakris en Hi-an kontraŭjapanajn junulojn. Ĝang kaj Jang do arestis Ĉiang Kajŝek en kuna agado. Tio estas la fama Hi-an-a Evento de la 12-a de decembro, 1936. Post kiam Ĉiang Kajŝek estis devigita akcepti la kondiĉojn de kunligiĝo kun la Komunista Partio por rezisti kontraŭ Japanio, li estis liberigita kaj revenis al Nankino.*

*2. De vintro de 1939 ĝis printempo de 1940 Ĉiang Kajŝek levis la unuan kontraŭkomunistan tajdon de post la komenco de la Kontraŭjapana Milito, sin preparante por kapitulaci al la japanaj agresantoj. Post kiam ĝi estis repuŝita de la Komunista Partio de Ĉinio, li, el sia kontraŭkomunista kaj kontraŭpopola naturo, daŭre klopodis por ekstermi la popolajn armitajn fortojn gvidatajn de nia partio kaj levis la duan kontraŭkomunistan tajdon. En la 4-a de januaro, 1941 la stabejo de nia Nova Kvara Armeo kaj ĝiaj subaj trupoj nombrantaj 9,000 homojn komencis marŝi norden por batali kontraŭ la japanaj agresantoj. Kiam ili atingis Sudan Anhuj, ili estis ĉirkaŭsieĝitaj de embuskantaj kuomintangaj reakciaj trupoj kun nombro de 70,000 homoj. La komandantoj kaj soldatoj de nia armeo brave batalis 7 tagojn kaj noktojn. Escepte de mil homoj, kiuj trarompis la sieĝon, ĉiuj aliaj heroe oferis sian vivon. Jen estas la fame konata Sud-Anhuj-a Evento.*

*3. Folio: Ĉine Je. Je estas la familia nomo de Je Ting, la komandanto de la Nova Kvara Armeo.*

*4. En la 22-a de marto, 1960, Prezidanto Maŭ faris gravan instrukcion pri la "Ĉarto de la Anŝan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio". Ĉefaj principoj difinitaj de la ĉarto estas: persisti en komando de la proleta politiko, plifortigi gvidon de la Partio, fari amasan movadon, praktiki partoprenon de kadroj en fizika laboro kaj de laboristoj en administrado, reformi neracian regularon, praktiki kombiniĝon de laboristoj, gvidantaj kadroj kaj teknikistoj, kaj fari teknikan renovigon kaj teknikan revolucion.*



*Nia bona Ĉefministro Ĝoŭ* pentrita de **He Kongde** kaj **Gaŭ Hong**

# Kie estas vi, Ĉefministro Ĝoŭ?

**KE JAN**

*Ĉefministro Ĝoŭ, nia bona ĉefministro,*
*Kie estas vi, ho kie estas vi?*
*Ĉu vi scias, ke ni vin sopiras,*
*—Via popolo vin sopiras!*

*Vokas ni al altaj montoj:*
*Ĉefministro Ĝoŭ —*
*Eĥas jen la valoj:*
*"Ĵuse li foriris, ĵuse li foriris.*
*Sur la longa voj' revolucia*
*Li laŭpaŝe sekvas ĉiam Prezidanton Maŭ!"*

*Vokas ni al la vastega tero:*
*Ĉefministro Ĝoŭ —*
*Tondras jen la tero:*
*"Ĵuse li foriris, ĵuse li foriris.*
*Ĉu vi ne vidas, ke sur tiuj pezaj spikoj*
*Ja ankoraŭ brilas liaj penlaboraj ŝvitoperloj . . ."*

*Vokas ni al la arbaroj:*
*Ĉefministro Ĝoŭ —*
*Muĝas jen la pinoj:*
*"Ĵuse li foriris, ĵuse li foriris.*
*Ĉe la ruĝa kampofajro arbhakistoj*
*Rememoras liajn ridojn kaj intimajn vortojn."*

*Vokas ni al maro:*
*Ĉefministro Ĝoŭ —*
*Mardefendaj batalantoj diras:*
*"Ĵuse li foriris, ĵuse li foriris.*
*Ĉu vi ne rimarkas*
*La surtuton de li surmetitan al mi . . ."*

*Ni serĉadas tra la vasta patrolando.*
*Ho, vi, Ĉefministro,*
*Estas ĉie, kie vin bezonas la revolucio.*
*Tra la vasta tero*
*Ĉie restas viaj klaraj piedsignoj.*

*Ni revenas al la koro de l' patrio.*
*Ni ameme vokas antaŭ Tian-anmen-pordego:*
*Ĉef-mi-nis-tro Ĝoŭ —*
*Jen Tian-anmen-placo eĥas:*
*"Ho mallaŭte, ho mallaŭte!*
*Li akceptas eksterlandajn gastojn en Ĝongnanhaj*,*
*Li prezidas nun kunvenon de l' Buroo Politika . . ."*

*Ĉefministro, nia bona ĉefministro!*
*Vi estas ĉi tie, ĉi tie!*
    *— Ĉi tie, ĉi tie,*
        *Ĉi tie . . .*

*Vi ĉiam estas kune kun ni,*
    *— Kune kun ni, kune kun ni,*
        *Kune kun ni . . .*
*Vi ĉiam loĝas ĉe la lok' de sunleviĝo,*
*Vi ĉiam vivas en la koro de l' popolo.*
*Vin sopiras la popolo de generacio al generacio!*
*Ho, ni sopiras vin, sopiras vin*
*Ni vin so-pi-ras . . .*


---

* *Sidejo de la Centra Komitato de KPĈ.*

# Ĉinaj havenoj




Ŝipfarejo de la nova haveno de Tiangin




La nova haveno de Dalian en nokto


La petrola haveno de Huangdaŭ





Ĝangiang-haveno





Ŝanhaja Haveno

Huangpu-haveno



# Batalo por la filmo pri Ĉefministro Ĝoŭ

de **LA CENTRA STUDIO DE DOKUMENTAJ FILMOJ**

La 8-a de januaro, kiel neforgesebla tago!

Tiutage en la pasinta jaro, la ĉina popolo perdis sian estimatan kaj amatan Ĉefministron Ĝoŭ; tiutage en la kuranta jaro, centoj da milionoj da popolanoj kun profundega malĝojo rigardis la koloran dokumentan filmon *Eternan Gloron al la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj,* en kinejoj, fabrikoj, landlimaj gardejoj kaj vilaĝoj tra la vasta lando de Ĉinio... Okcent milionoj da okulparoj volas denove vidi la bonan ĉefministron de la popolo kaj okcent milionoj da koroj sopiregas la bonan ĉefministron de la popolo! La filmo registras malgajajn scenojn de funebrado de la tuta lando pri Ĉefministro Ĝoŭ kaj prezentas gravajn fragmentojn el la malegoisma kaj sentima vivo de Ĉefministro Ĝoŭ kiu batalis por la liberiga afero kaj la socialismaj revolucio kaj konstruado de la ĉina popolo kaj por la luma estonteco de la tutmonda revolucia popolo.

Kial tiu kortuŝa filmo ekmontriĝis al la ĉina popolo unu tutan jaron post la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ? Ĉu ĝi ne estis produktita pli frue? Ne! Ĝi estis kruele sufokita de la "kvarpersona bando". Hodiaŭ ni publikigu la historion pri la farado de tiu filmo kaj malkaŝu la sufokadon de la "kvarpersona bando" al tiu filmo, por ke vi vidu la monstran fiagon de la bandaĉo en opono kontraŭ nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ.

## "LA POPOLO VOLAS KE NI FILMU!"

La 8-an de januaro, 1976, nia estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ forlasis nin. Tiu korŝira malĝojiga informo forte frapis nin! Grandega malĝojo kaj profunda karmemoro plenigis nian koron. Nia vico de dokumentaj filmistoj ja estis persone fondita de Ĉefministro Ĝoŭ. En la pasintaj kelkdek jaroj, Ĉefministro Ĝoŭ ame flegadis kaj nutradis nin per Maŭzedongpenso. Ĉiuj el ni decidis fari sian kontribuon en farado de filmo pri funebrado de la diversnaciecaj popolanoj pri la granda proleta revoluciisto kaj eminenta komunisma batalanto Kamarado Ĝoŭ Enlaj.

Kun flamanta koro ni nin ĵetis en streĉan filmadon. Iuj senprokraste veturis al diversaj lokoj; aliaj deĵoris tage kaj nokte ĉe la korpo de Ĉefministro Ĝoŭ; triaj klopodadis surstrate por filmi popolanojn en dolora funebro. Nia penso okupiĝis nur pri unu afero: multe, rapide kaj bone registru la malĝojegan tempon por ĝin konservi en la majestaj analoj. Ni profunde sentis, ke la popolo de la tuta lando deziregas, ke ni ebligu al ili pli frue vidi la forpasintan Ĉefministron Ĝoŭ por funebro kaj pli bone lerni kaj karmemori lian brilan vivon.

Sed ĝuste tiam nigraj nuboj falis sur nin kaj nigra mano etendiĝis al nia laboro. La pesta "kvarpersona bando", kiu malamegis Ĉefministron Ĝoŭ, ĉiamaniere klopodis por malebligi al ni bone fari tiun filmon. Sed ili sciis, ke estis neeble publike malpermesi faradon de tiu filmo, tial ili devis montri subtenan geston. Tamen faktoj montris, ke tuj de la komenco ili jam intrige faris planon por sufoki la filmon.

Vespere de la 8-a de januaro, konfidenculo de la "kvarpersona bando" en la Ministerio de



*Pekinaj urbanoj kun larmoj staras ĉe ambaŭ flankoj de Ĉang-an-strato por adiaŭi Ĉefministron Ĝoŭ.*

Kulturo telefonis al ni: "Forpasis la ĉefministro. La Centra Komitato decidis farigi filmon, do vi preparu vin por tio..." Li faris nur tian atentigon per kelkaj vortoj kaj tute ne parolis, kiel bone plenumi la laboron. Kontraŭe, kiam ni raportis al li en la sekvanta tago, ke ni intencas filmi funebrajn aktivadojn de amasoj en la lokoj, kie Ĉefministro Ĝoŭ faris revoluciajn aktivadojn dum sia vivo, tiu konfidenculo de la "kvarpersona bando" esprimis malkontenton kaj foje kaj refoje emfazis, ke ni agu laŭ "la postuloj de la Centra Komitato". Timante ke ni ne komprenis tion, li speciale donis ekzemplon: "Nia modela teatra trupo ja faras prezentadon kiel kutime!" Kvankam ni komprenis lian aludon, tamen ni neniel povis agi laŭ ĝi. Ni havis sentimenton tute kontraŭan al ilia kaj nia konscio pri la revolucia devo stimulis nin bone fari la filmon pri funebrado pri Ĉefministro Ĝoŭ.

Tuj ekblovis alia diabla vento. Jaŭ Venjuan diris: "Faru la filmon pri la ĉefministro ne haste, sed malrapide." Kial li faris tian absurdan instrukcion pri tiel grava filmo? Ni sentis, ke tio estas intrigo.

La "kvarpersona bando" faris unu post alia multajn malpermesojn: estas malpermesite okazigi funebran kunvenon, estas malpermesite porti funebran nigran brakrubandon, estas malpermesite prezenti florkronojn... Sed la vastaj popolamasoj protestis kontraŭ tio. La estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ penlaboris dum sia tuta vivo por la revolucio kaj la popolo, li estas ĉefministro de la tutlanda popolo. Kial la popolo ne povas okazigi funebran kunvenon pri li? Popolamasoj de diversaj lokoj indigne spitis la malpermesojn, kaj ni sentime registris la malĝojon kaj indignon de la popolamasoj proteste kontraŭ la fiago de la "kvarpersona bando".

Kiam ni filmis la funebrajn aktivadojn de miloj kaj miloj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj ĉirkaŭ la Monumento de Popolaj Herooj sur Tian-anmen-placo, la "kvarpersona bando" tre malkontentiĝis kaj instrukciis pere de sia konfidenculo: "Vi ne devas filmi antaŭ Tian-anmen-pordego. Pli kaj pli multe da homoj kolektiĝis pro via aktivado. Vi devas respondeci pri eventuala incidento kaŭzita de via filmado!" Ĉar tie estis funebraj aktivadoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tial ni povis ilin filmi. Ĉu filmisto mem povus kolekti tiel multe da amaso?

Ĉiufoje kiam ni levis niajn filmfotilojn, niaj okuloj tuj vualiĝis de larmoj. Kiel multe da emociaj scenoj restas ankoraŭ klaraj en niaj okuloj:

Alvenas maljuna batalanto kun grizaj haroj ĉe la tempioj portante florkronon per ambaŭ

manoj kune kun ĉiuj siaj familianoj. La fera viro nefleksebla sub minaco de obusoj kaj bajonetoj verŝas larmojn sur la marmoran ŝtupetaron de la monumento.

Alvenas piedire al la placo membroj de popolaj komunumoj kun florkronoj, de dekoj da lioj fore, eĉ de pli ol cent lioj fore. Alrapidas laboristoj tuj post sia dejorado eĉ sen ŝanĝo de siaj bluzoj.

Ĵus eltrajniĝintaj pasaĝeroj kun pezaj valizoj sukcesis, post demandado pri la vojo, alveni al la monumento, kaj ili senvorte larmadas torente por funebro.

Ruĝgvardianetoj plore diras: "Ĉefministro Ĝoŭ, Onklo Ĝoŭ, estu trankvila..." Iliaj vortoj kortuŝas nin, kaj la blankaj floretoj, kiujn ili fiksis sur la ĉenoj de la barilo de la monumento kaj iliaj slipoj kun surskribaĵoj kiel "viaj infanoj" estas kaj emociaj kaj konsolaj.

Homamasoj alfluadis tage kaj nokte. Florkronoj amasiĝis kiel monteto kaj pinoj kaj cipresoj tie estis plene kovritaj de blankaj floroj. La popolanoj estis en tia profunda malĝojego, kaj tamen ili restis tiel firmaj.

Tio estis manifestiĝo de la estimo de la popolamasoj al Ĉefministro Ĝoŭ, kiu plenenergie kaj tutkore servadis al la popolo ĝis la lasta minuto de sia vivo.

Ni spitis la malpermesojn de la "kvarpersona bando". "Ni ne obeu ilin, kaj filmu!" Kiam oni riproĉe demandis nin en telefono, kiu volas ke ni filmu, ni respondis laŭte: "La popolo! La popolo volas ke ni filmu!" La popolo, ĝuste la popolo nin subtenis kaj ĝuste Maŭzedongpenso donis al ni forton.

Kiam ni laboris antaŭ la Monumento de Popolaj Herooj en profunda nokto, iu laboristo alveninta post dejorado diris al ni: "Vi estas ĵurnalistoj konsciencaj. Multe fotu por la estontaj generacioj!" Tiaj varmaj kaj simplaj vortoj nin kuraĝigis.

Kiam ni devis hasti al diversaj lokoj por laboro, laborantoj de la Buroo de Civila Aviado klopodis forveturigi nin tuj je nia peto, por garantii glatan plenumon de nia tasko.

Kiam ni filmis la duonmastan hisadon de la nacia flago antaŭ Tian-anmen-pordego, dejorantaj popolaj policanoj meminiciate helpis nin direkti aŭtojn. Kaj preterpasantoj kaj pasaĝeroj en aŭtobusoj demetis siajn ĉapojn kaj respektoplene staris por funebri pri la estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ.



*Homfluoj al la Monumento de Popolaj Herooj por prezenti florkronojn al Ĉefministro Ĝoŭ.*

Kiam ni registris muzikaĵojn por la filmo, kamaradoj de la Ĉina Opera Trupo meminiciate sin proponis kiel plenumantojn de akompanaj kantoj. Ni postulis nur 60 kantistojn, sed venis al ni pli ol 80. Iu maljuna kamarado, kiu jam multjare ne prezentis sur scenejo pro malsano, diris: "Lasu min iom kanti por la ĉefministro, mi iom kantu!"

. . . . . .

Dum la filmado, ni vidis la abomenindajn agojn de la "kvarpersona bando" kaj sentis malamegon en la koro. Kiam ni iris al la Pekina Hospitalo por filmi la forpasintan Ĉefministron Ĝoŭ, ni sentis neesprimeblan sentimenton, tuj je enpaŝo de la ĉambro en kiu kuŝis la forpasinto. Tie ni vidis la profundan klasan amon de la veteranaj revoluciistoj al Ĉefministro Ĝoŭ; ni vidis ke laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sin ĵetis al Ĉefministro Ĝoŭ kaj lamentis piedbatante la plankon; kaj ni vidis ke amasoj atendadis en frosta vento antaŭ la pordego de la hospitalo kaj longe ne volis foriri...

## "KVAR TRANĈILOJ" ĴETITAJ AL LA FILMO

Post 20 diurnoj, la filmo *Eternan Gloron al la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj* estis elfarita en larmado de la kamaradoj de nia tuta studio kaj en atmosfero de majesteco kaj alta estimo. Tamen ni maltrankviliĝis, ĉu nia filmo povos eskapi el la diablaj ungoj de la "kvarpersona bando", ĉar tiam ni jam informiĝis, ke la televida filmo pri funebrado de Ĉefministro Ĝoŭ jam estis sufokita de Jaŭ Venjuan.

En la 28-a de januaro, kiam la Funebra Komitato reviziis la filmon, antaŭ ol multaj respondecaj kamaradoj faris parolon, konfidenculo de la "kvarpersona bando" instalita en la Ministerio de Kulturo jam elsaltis malpacience. Li elpoŝigis paperslipon kaj elĵetis 4 antaŭpreparitajn opiniojn: "1. Ĉu estas bone enmeti parton pri la vivo de Ĉefministro Ĝoŭ? La dekkelkminuta filmo ne povas prezenti la tutan vivon de la ĉefministro kaj tamen la filmo estas longigita. Estas preferinde forigi ĝin. 2. La funebra aktivado de la amasoj sur Tian-anmen-placo estas neoficiala. Ĉu estas bone filmi tion? La Centra Komitato ne decidis fari tian aktivadon, se oni tion prezentos per filmo, ĉu tio ne signifos oficialigon de tio? 3. Estas tro multaj planoj pri la amasoj starantaj ambaŭflanke de Ĉang-an-strato rigardantaj la preterpason de la aŭto kun la ĉerko de la ĉefministro. Detranĉu. 4. Ĉu estas dece montri ploregojn? Plej bone ne prezentu plorantojn. Faru laŭ la opinio de Jaŭ Venjuan donita dum reviziado de la televida filmo. Kaj krome, ne prezentu florkronon kun partia standardo en la mezo." Kaj fine li diris kun malŝato: "La tuta filmo estas tro longa, oni devas ĝin mallongigi." Tiutempe multaj respondecaj kamaradoj malkonsentis lian opinion. Iu el ili diris: "Kial oni ne povas prezenti per filmo diversajn formojn de funebrado pri Ĉefministro Ĝoŭ?" Li opiniis, ke post malgrava modifo la filmo jam povas esti sendita al la Centra Komitato de la Partio por revizio. Tion aŭdinte la konfidenculo de la "kvarpersona bando" flamiĝis kaj diris minace: "Tiam vi devas aldoni nian opinion." Tiu "nian" klare montris al ni la monstran vizaĝon de la "kvarpersona bando".

La kvar opinioj de la "kvarpersona bando" ja estas "kvar tranĉiloj". Ili intencis forhaki la brilajn farojn de Ĉefministro Ĝoŭ, la amon de la tutlanda popolo al li kaj la intimegan rilaton inter li kaj la popolo, sed tio estas ĝuste la spegulenda objekto de la filmo.

Ĉefministro Ĝoŭ dediĉis sian tutan energion al la ĉina revolucio, la ĉina popolo kaj la internacia komunisma afero. La ekstreme profunda malĝojo vekita de lia forpaso estas ĝuste speguliĝo de la brilaj faroj de lia tuta vivo en la koro de la popolo. La funebrado antaŭ Tian-anmen-pordego, la amasa adiaŭado al lia ĉerko-veturilo sur Ĉang-an-strato, la florkronoj kun la partia standardo en la mezo, la blankaj floroj sur la pinoj kaj cipresoj ktp. estas ĝuste kristaliĝo de la amego kaj alta estimo de la popolo al Ĉefministro Ĝoŭ. Tia profunda sentimento estas ne barebla de ĉia ajn forto. Tiuj scenoj formis imponan himnon de malĝojo kaj historian bildserion, patose kantantan pri la grandeco de Ĉefministro Ĝoŭ kaj lia brila vivo. La forto de la popolo manifestita en tiuj scenoj estas

forta protesto al la "kvarpersona bando" kaj baroj al ĝia uzurpado de la gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato.

Kiel oni povas forigi tiajn fortajn planojn? Kiel oni povas fortondi tiajn bildojn prezentantajn klarajn amon kaj malamon kaj firman starpunkton de la popolo? Forigo de tiaj planoj ja signifas ŝanĝon de la historio kaj krimon kontraŭ la popolo.

Tiam niaj kamaradoj diris: "Ni ne povas plu detondi; estas preferinde ne publikigi la filmon ol detrui la kompletan materialon." Kiel grandajn malĝojon kaj indignon tiuj vortoj entenis!


Kiel atendite, kiam nia studio denove sendis la filmon al la Ministerio de Kulturo regata de la "kvarpersona bando" post kelkaj tagoj por revizio, la konfidenculo de la "kvarpersona bando" eĉ diris: "Tiun ĉi filmon la Ministerio de Kulturo ne prizorgis, vi vin turnu al la Funebra Komitato!" Sed ĝuste tiu konfidenculo estis la respondeculo pri filmoj de la Propaganda Sekcio de la Funebra Komitato. Tiamaniere ili malpermesis publikigi tiun brilan filmon kaj ĝin sufokis.

## NAŬ MONATOJ PLENAJ DE MALĜOJO KAJ INDIGNO

La filmo estis kruele sufokita de la "kvarpersona bando". Kaj tio kvazaŭ ŝtono pezis en la koro de ĉiuj laborantoj de la studio. Ĉie kien ni iris, oni demandis nin anksie: "Kial ankoraŭ ne prezentiĝas la filmo pri funebrado de Ĉefministro Ĝoŭ? Ni sopiras lin!" Sennombraj leteroj estis senditaj al ni por esprimi tiun komunan deziron.

Tiutempe, pro la faŝisma diktaturo de la "kvarpersona bando", la deziro de centoj da milionoj da popolanoj estis subpremata. Sed ni firme kredas Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson; ni firme kredas ke la filmo finfine prezentiĝos al la popolo de la tuta lando. Ni decidis zorgeme protekti ĝin, protekti tiun valoregan historian materialon.

La pasintaj naŭ monatoj estis neforgeseblaj, plenaj de malĝojo kaj indigno. Ni atendis kaj atendadis la tagon, kiam efektiviĝos la kora deziro de la centoj da milionoj da popolanoj.



*La ĉirkaŭaĵo de la Monumento de Popolaj Herooj estas plene kovrata de blankaj floroj.*

**"Je kanto de virkok' heliĝis tuta l' homa mondo".**

Je kriza momento de la revolucio, daŭrigante la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio estrata de nia saĝa gvidanto Prezidanto Hua Guofeng faris decideman paŝon kaj frakasis la intrigon de la "kvarpersona bando" de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ celantan uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, kaj savis la revolucion kaj la Partion. Ankaŭ la filmo pri funebrado de Ĉefministro Ĝoŭ ricevis novan vivon.

Nun la filmo *Eternan Gloron al la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj* estas publikigita.

Ĉefministro Ĝoŭ fidelis dum sia tuta vivo al la granda gvidanto kaj instruisto Prezidanto Maŭ kaj al Marksismo-Leninismo. En la lastaj horoj de sia vivo li ankoraŭ kantis *La Internacion*: "Unuiĝu en rond', kaj la Internacio triumfu en tutmond'." Tio estas la nobla celo por kies efektiviĝo Ĉefministro Ĝoŭ batalis dum sia tuta vivo kaj ankaŭ lia valorega testamento al ni.

Eternan Gloron al la estimata kaj amata Kamarado Ĝoŭ Enlaj, la bona ĉefministro de la popolo.

DU ĜIBING:

# Kial ili sufokis la filmon "La Pioniro"?

En februaro de 1975, kiam la ĉina popolo ĝoje pasigis la Printempan Feston, la kolora filmo "La Pioniroj" farita de la Ĉangĉun-a Studio prezentiĝis al la publiko. (Artikolo pri la filmo aperis en n-ro 1, 1976, de nia gazeto.) Tiu filmo varme kantas pri la ĉiamvenka Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj pri la granda venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Per la krea metodo de revolucia realismo kaj revolucia romantikismo en kombino, la filmo skulptis en batalado la heroan figuron de ĉina petrola laboristaro armita per Maŭzedongpenso kaj laŭte kantis pri la ruĝa flago de Daking starigita de Prezidanto Maŭ. Tiu verko vidigas al ni spurojn de antaŭenmarŝo de revoluciaj literaturaj kaj artaj laborantoj en la direkto montrita de Prezidanto Maŭ en la "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an". Kaj en ideologio kaj en arto, tiu ĉi filmo havas lokon inter la eminentaj verkoj aperintaj en la lastaj jaroj.

Pere de la proletaj heroaj figuroj reprezentataj de Ĝoŭ Tingŝan kaj Hua Ĉeng, la filmo sukcese spegulas la grandan batalon de nia petrola laboristaro por rapide disvolvi la petrolan industrion de nia lando, prenante klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, persistante en la fundamenta linio de la Partio, aplikante la brilajn verkojn "Pri Kontraŭdiro" kaj "Pri Praktiko" de Prezidanto Maŭ kiel direktilon kaj sin gvidante per la granda principo de Prezidanto Maŭ konstrui socialismon **"memdecide kaj sendepende kaj apogante sin sur propraj fortoj"** kaj per la ĝenerala linio streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie; ĝi plene montras la sentiman revolucian spiriton de la ĉina laboristaro en batalo kontraŭ la naturo kaj la en- kaj eksterlandaj malamikoj.

La filmo "La Pioniroj" kun revolucia politika enhavo kaj grandefekta artisma aranĝo estis varme akceptata de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili diris, ke "La Pioniroj" estas bona filmo spegulanta klasbatalon kaj la batalon inter la du linioj, ĝi estas bona ilo por fari edukon pri la revolucia tradicio de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj kaj bona verko servanta al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili kore ŝatas ĝin. Tiu filmo vivece spegulas la revolucian volon kaj batalan spiriton de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kuraĝigas ilin sin ĵeti kun nova animstato en novajn batalojn por krei ankoraŭ pli brilajn fruktojn; ĝi ludis batalan rolon en unuigo kaj edukado de la popolo kaj bato kaj ekstermo al la malamiko.

Sed kiam tiu filmo estis laŭdata de la vastaj amasoj, la burĝa karieristino Giang King, kiu senhonte nomis sin "standardisto de la literatura kaj arta revolucio", la unua hakis ĝin per buĉista glavo. Rigardinte la filmon, Giang King ekkoleregis kaj flamiĝe demandis, kial oni faris tian filmon kaj kiun oni intencas glorigi per ĝi. Ŝi diris, ke se oni faros plue tiajn filmojn, estiĝos reviziismo. Ŝi deklaris arbitre, ke la filmo "havas gravajn erarojn kaj en politiko kaj en arto". Ŝi demandis malice, kiun la filmo prikantas, deklaris ke ŝi "faros enketon pri ĝia fono" kaj ordonis skribi "kritikajn artikolojn kontraŭ ĝi". En la sekvanta tago post la publika projekcio de la filmo, la "kvarpersona bando" tuj donis ordonon de kvar malpermesoj: 1. ne faru plu kopiojn; 2. ĉesu ĝin dissendi per radio kaj televido; 3. ĝin ne distribuu al eksterlando; 4. ne publikigu artikolojn pri ĝi en ĵurnaloj.

Tuj poste, Jaŭ Venjuan, membro de la "kvarpersona bando", persone ordonis skribi artikolon por kritiki la filmon kaj ĝin aperigi en gazeto.

Kaj sekve, la nomo "La Pioniroj" malaperis en la anoncoj pri filmoj. En la 8-a de aprilo, 1975, Giang King persone movis kaj direktis siajn konfidulojn fabriki t. n. "dek ĉefajn erarojn" de la filmo.

Por sufoki la filmon, la "kvarpersona bando" kruele persekutis la verkinton de "La Pioniroj". Ili sendis fari enketadon en diversaj lokoj kun la espero trovi ateston por kulpigi kaj persekuti la verkinton kaj sekve komplete nei la filmon. Poste, ŝi venigis al Pekino koncernajn respondeculojn, la reĝisoron, fotistojn kaj aktorojn de la filmo "kunsidi" duonmonate. En tiu kunsido la "kvarpersona bando" deklaris "dek ĉefajn erarojn" de la filmo kaj devigis la ĉeestantojn "studi por kompreni" kaj "ŝanĝi sian penson".

Oni ne povas ne demandi al si, kial la "kvarpersona bando" tion faris? Kial ili tiel malamis la filmon "La Pioniroj"? Kial unu filmo tiel maltrankviligis la "kvarpersonan bandon", ke ili sentis kvazaŭ ili vizaĝus al potenca malamiko, ĉiuj ekagis kaj faris frenezan kontraŭrevolucian "ĉirkaŭekstermon" al la filmo kaj ĝiaj kreintoj?

En tio kaŝiĝis giganta kontraŭrevolucia intrigo!

La "kvarpersona bando" havis fortan antipation al Daking — la ruĝa flago persone starigita de Prezidanto Maŭ, kaj ne rekonis, ke Daking prosperiĝis sub la gvido de la Partio dank' al studo de la brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ "Pri Praktiko" kaj "Pri Kontraŭdiro". Ĝi deklaris absurde, ke Daking estas "spontaneaĵo". Kaj la filmo "La Pioniroj" ĝuste prenis Daking kiel sian fonon kaj vivece priskribis la batalan vivon kaj heroan aferon de petrolaj laboristoj, kiuj ekspluatis petrolkampon sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ sin apogante sur la propraj fortoj. Tio kompreneble ne konformis al la bezono de la "kvarpesona bando" en kontraŭpartia aktivado, tial ĝi rigardis la filmon kiel sablon en iliaj okuloj. Ili malamis la heroan figuron de Ĝoŭ Tingŝan, ĉar li senkompate malkaŝis perfidulon kiel Feng Ĉaŭ, kiu senhonte rampis el malamika karcero. Ĝoŭ Tingŝan diris: "Iuj kompartianoj flirtigas socialisman flagon, tamen iras alian vojon. Tiaj homoj troviĝis en 1957 kaj 1959, kaj ankoraŭ troviĝas hodiaŭ." "Oni devas esti aparte singardemaj kontraŭ tiaj homoj kiuj portas ruĝan ĉapon surkape, tamen havas nigran koron en la brusto." Tiuj vortoj tiel forte maltrankviligis la "kvarpersonan bandon", ke ilia karno konvulsiis kaj ili ne povis sidi kviete, ĉar ili estas ĝuste tiaj homoj. Alia ankoraŭ pli insida kontraŭrevolucia intrigo de la "kvarpersona bando" en sufokado de la filmo estis ataki Ĉefministron Ĝoŭ Enlaj profunde amatan de nia popolo. Estis Ĉefministro Ĝoŭ, kiu alvokis al la tutlanda popolo studi la verkojn de Prezidanto Maŭ "Pri Praktiko" kaj "Pri Kontraŭdiro"; estis Ĉefministro Ĝoŭ kiu elmetis laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ la principon de konstruado de la olekampo en kombino de urbo kun kamparo; estis Ĉefministro Ĝoŭ kiu zorge flegadis Daking-olekampon laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, kaj postulis fari propagandon pri tiu ruĝa flago. Ĝuste pro tio, ke Ĉefministro Ĝoŭ estis ĉiam fidela al la Partio kaj al la popolo, rezolute plenumis kaj defendis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, rezolute praktikis la principon elmetitan de Prezidanto Maŭ **"praktiku Marksismon, kaj ne reviziismon; unuiĝu, kaj ne splitiĝu; estu malkaŝemaj kaj honestaj, kaj ne faru konspirojn kaj intrigojn"**, kaj pro tio la "kvarpersona bando" malamegis la estimatan kaj amatan Ĉefministron Ĝoŭ kaj ĉiamaniere klopodis insidi lin por preni lian pozicion.

Tio estis la kontraŭrevolucia intenco de la "kvarpersona bando" en kruela sufoko de la filmo. Ili sufokis la filmon por krei publikan opinion favoran al ilia uzurpo de la gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato, tio estis grava konsistiga parto de ilia kontraŭrevolucia intrigo.

*Petrolaj laboristoj ĉerpas forton el la verkoj de Prezidanto Maŭ* Pri Kontraŭdiro *kaj* Pri Praktiko.



La revolucia popolo armita per Maŭzedong-penso ne submetiĝis al la forta subpremo. La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj brave diris: "Ni ŝatas tian filmon malgraŭ la opono de ĉiu ajn, kaj tiu filmo forte stimulas kaj kuraĝigas nin." La "kvarpersona bando" malpermesis la filmon, sed laboristoj ĝin prezentis en siaj fabrikoj; la "kvarpersona bando" volis kritiki ĝin, sed kamparanoj ĝin laŭdis en siaj komunumoj. En julio de 1975, membro de iu filmprojekcia grupo de la Produkta kaj Konstrua Korpuso de Hejlonggiang-provinco malkonsentis al la "dek ĉefaj eraroj" atribuitaj al "La Pioniroj" kaj pro tio la "kvarpersona bando" sendis specialan enketanton kun la intenco kruele persekuti la projekciiston.

Kiam la "kvarpersona bando" svingis klabon al "La Pioniroj" kaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, Prezidanto Maŭ faris brilan noton sur la letero per kiu la aŭtoro de "La Pioniroj" akuzis la "kvarpersonan bandon": **"Tiu ĉi filmo ne havas gravajn erarojn kaj mi proponas aprobi eldonon de ĝi. Ne postulu perfektecon. Estas eksceso atribui al ĝi dekon da eraroj, kaj tio malutilas al ĝustigo de la literatura kaj arta politiko en la Partio."**


La brila noto de Prezidanto Maŭ donis neelĉerpeblan forton al la popolamasoj, kiuj estis batalantaj kontraŭ la "kvarpersona bando". Prezidanto Maŭ montris akre, ke **"tiu ĉi filmo ne havas gravajn erarojn"**. Per tio li jesis la ĝeneralan direkton de la filmo kaj samtempe kritikis, en politika linio, la "kvarpersonan bandon", kiu montris trokritikemon al la eminenta filmo kaj senbride atribuis al ĝi erarojn. Per tio li ne nur savis eminentan filmon el sub la feraj hufoj de la "kvarpersona bando", sed, pli grave, klare montris, ke la serioza batalo disvolviĝinta ĉirkaŭ tiu filmo estis akra kaj intensa klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. Prezidanto Maŭ eksplike esprimis pri la filmo kondamnita de la "kvarpersona bando" al morto: **"Mi proponas aprobi eldonon de ĝi"**, kaj samtempe li montris ke oni devas fari **"ĝustigon de la literatura kaj arta politiko en la Partio"**. Per tio li donis varman subtenon al la forta volo de centoj da milionoj da laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj direktis kritikan lancon rekte al la faŝista diktaturo praktikata de la "kvarpersona bando" en la literaturaj kaj artaj rondoj. La noto farita de Prezidanto Maŭ pri "La Pioniroj" estas varma subteno al la revoluciaj literaturo kaj arto de la proletaro kaj peza bato al la "kvarpersona bando", kiu freneze sufokis la revoluciajn literaturon kaj arton de la proletaro.

La brila noto de Prezidanto Maŭ pri la filmo malkaŝis la maskitajn kontraŭrevoluciajn diablajn vizaĝojn de la "kvarpersona bando" kaj kondamnis al morto la faŝisman regadon de tiu bando super la literaturaj kaj artaj rondoj.

Tiu bando malamas la noton de Prezidanto Maŭ. Unuflanke ĝiaj membroj kontraŭstaris la gravan noton de Prezidanto Maŭ per diversaj malnoblaj rimedoj, aliflanke ili plue subpremis personojn koncernantajn al la filmo. Foje Giang King histerie insultis la aŭtoron de "La Pioniroj", dirante ke li "fidenuncis" ŝin, "mensogis" kaj devas esti "riproĉita". Ŝi eĉ kriis arogante: "Ne obei min signifas ne obei la Partion." Ŝia kontraŭstaro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ŝia sovaĝa ambicio uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato malkaŝiĝis en ŝiaj vortoj. Ŝi eĉ devigis la aŭtoron de "La Pioniroj" skribi alian leteron al Prezidanto Maŭ por fari memkritikon, retiri la antaŭan leteron kaj proponi ne distribui la filmon eksterlande kaj postuli fari alian novan filmon de la sama titolo. Ŝi intencis per tia manovro nei la opinion de Prezidanto Maŭ esprimitan per la noto. Ĉio tio kompreneble estis malakceptita.

Frakasiĝis la "kvarpersona bando", kaj venkis la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kiam la popolo de la tuta Ĉinio ĝoje festas la venkon, la grava noto de Prezidanto Maŭ pri "La Pioniroj" fine publikiĝis al la popolamasoj. Tio estis granda ĝojinda afero en la politika vivo de la ĉina popolo. En la lumo de tiu brila noto de Prezidanto Maŭ kaj sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, la socialisma literatura kaj arta ĝardeno de nia lando certe fariĝos ankoraŭ pli ĉarma per miloj kaj miloj da pompaj kaj buntaj floroj en la batalo por malkaŝi kaj kritiki la "kvarpersonan bandon".

# Papertondaĵoj




Kolektado de sterko — de **Jang Ĝaŭkjun, Ju Junhiang** kaj **Ĝoŭ Venhua** (komunumanoj)



Umefloroj
de **Ĝang Jongŝoŭ** kaj **Ĝang Hiufang**


Lernado de akupunkturo — de **Ĝu Ĝongjaŭ**



Novaj paŝtistinoj sur stepo — de **Ĝuang Liĉeng**



Kristale glazuritaj vinujoj cervoformaj




# Ceramikaĵoj de Hunan–provinco

Ceramiko de Hunan havas historion de pli ol mil jaroj. La ceramikaĵoj dividiĝas en artajn kaj vivbezonajn kaj havas grandan debiton en kaj ekster la lando pro iliaj multaj specoj, belaj formoj kaj malaltaj prezoj.


Post la Liberiĝo, disvolvante sian saĝon kaj talenton, la ceramikistoj de Hunan senĉese renovigis teknologion por altigi kvaliton de la produktaĵoj, tiel ke la totala produktokvanto de vivbezonaj ceramikaĵoj kreskis ĉiujare je 30.5% kaj ankaŭ iuj tradiciaj produktaĵoj, kiuj sin trovis en agonio en la pasinteco, akiris novan vivon.

Nun, Hunan jam fariĝis unu el la gravaj lokoj produktantaj ceramikaĵojn de Ĉinio. Ĝiaj produktaĵoj karakteriziĝas per kristaleco, diafaneco, eleganteco kaj delikateco. Inter ili ceramikaĵo kun subglazura kolora desegno havas apartan karakterizaĵon. Por fari ĝin, oni unue devas desegni bildojn sur bakita argilaĵo, ĝin glazuri kaj poste ĝin baki en temperaturo de pli ol 1,300 gradoj. Ĝi ne entenas plumban venenon kaj estas rezistanta al acido kaj alkalo, helkolora, diafana kaj kolorkonserva.



Kristale glazurita ĉevalo

Kruĉo kaj taso kun bluaj peonioj




Fajenca kruĉo kun flava glazuro





Maldika bovlo kun glazura gravurajo

Fajenca poto kun verda glazuro






Penda telero kun subglazura kolora desegno

# Ligno-gravuraĵoj



Printempa pluvo de **Ĝu Licun**

Bonvenigo al novaj homoj de **Sun Mingtie**



# Pri Dek Gravaj Interrilatoj

(La 25-an de aprilo, 1956)

## Maŭ Zedong


**Tio ĉi estas parolado de Kamarado Maŭ Zedong ĉe plivastigita kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Prenante lecionon el la sperto de Sovetunio, Kamarado Maŭ Zedong resumis en la parolado la sperton de nia lando, traktis pri dek gravaj interrilatoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj elmetis la bazan ideon de la ĝenerala linio konforman al nia stato konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie.**

Ĝi aperas en la lingvoj ĉina, angla, franca, hispana, germana, rusa, japana, itala, araba, portugala, persa, indonezia, hindia, bengala, korea, vjetnama, svahilia, taja kaj Esperanto

**Mendu ĉe nia agenta librejo en via loko aŭ rekte ĉe GUOZI SHUDIAN, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio**

**Eldoninto:** Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

**Ĝenerala Distribuanto:** GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio




### LA UNUA FOSFOSIDERITA MINO EN NORDA ĈINIO


Laborantoj de la Metalurgio-Geologia Prospektora Kompanio de Norda Ĉinio trovis en Hebej-provinco grandan fosfosideritan minon kaj per tio faris kontribuon por disvolvi industrion de fosfora sterko kaj akceli la agrikulturan produktadon.

### RIĈA RIKOLTO DE GINSENGO EN FUSONG-GUBERNIO

La nomita gubernio troviĝas en regiono de Ĉangbaj-montaro de Gilin-provinco. Ĝi estas unu el la gravaj produktaj lokoj de ginsengo de nia lando. La totala produkto-kvanto de ginsengo en 1976 kreskis je 3 pocentoj kompare kun tiu de 1975 kaj estis 3.7-oblo de tiu de 1965.

### PLI MULTE DA MOSO-BAMBUOJ EN FUGIAN-PROVINCO

En Fugian-provinco, unu el la ĉefaj produktaj regionoj de moso-bambuoj (*Phylloslachys pubescens*) de Ĉinio, lastjare oni sukcesis aĉeti 14,820,000 moso-bambuojn en tiu provinco.





*La kunvenejo de la Dua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo*

# La Movado de Lerno en Agrikulturo Marŝas

EN la kamparo de Ĉinio ĉiam ekzistas serioza batalo pri la problemo de lerno de Daĝaj en agrikulturo. En la batalo la ruĝa flago de Daĝaj flirtas tra la vasta lando kaj fariĝis pli brila.

Daĝaj estis malgranda montvilaĝo kun 83 familioj. Ĝi situas en la Tajhang-a montregiono de norda Ĉinio, je 1,000 metroj super la mara nivelo, kaj ĝiaj naturaj kondiĉoj estas tre malbonaj. En la jaro 1946 ĝi havis nur 53 hektarojn da agro preskaŭ nekultureblajn inter montoj kaj valoj. Dank' al praktikado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, persistado en irado de la socialisma vojo kaj sinapogo sur la propraj fortoj, ĝi ŝanĝis, post peniga klopodado de multaj jaroj, sian antaŭan fizionomion de malriĉeco kaj postiĝinteco, kaj konstruiĝis en prosperan socialisman novan kamparon. Ĝia hektara produktokvanto altiĝis de 0.75 tuno ĝis 7.5 tunoj. En 1964 la granda gvidanto kaj instruisto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ faris alvokon al la tuta lando **"Lernu de Daĝaj en agrikul-**



estis opoziciantaj al lernado de Daĝaj. Ankaŭ la "kvarpersona bando" faris la samon, kaj eĉ pli freneze.

En septembro de 1975, laŭ decido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, Kamarado Hua Guofeng kunvokis kaj prezidis la Unuan Tutlandan Konferencon por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo. Tiu konferenco resumis la sperton en disvolvo de la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj en agrikultura meĥanizado post la alvoko de Prezidanto Maŭ, kaj mobilizis la tutan Partion kaj la tutan popolon al la peniga batalo por ĝeneraligi la Daĝaj-tipan gubernion. Ĝi respegulis la volon kaj urĝan postulon de la centmilionaj popolanoj de nia lando kaj markis, ke la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo iris en novan etapon.

La normoj de la Daĝaj-tipa gubernio difinitaj de la konferenco estas: 1) ĝi havas sian unuiĝan kaj batalan gubernian partian komitaton kiel la gvidan centron, kiu rezolute plenumas la linion kaj politikojn de la Partio; 2) ĝi formis la klasan superecon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj povas fari rezolutan batalon kontraŭ kapitalisma aktivado kaj praktiki efikan kontrolon kaj reformon al la klasaj malamikoj; 3) la kadroj de la gubernio, komunumoj kaj brigadoj povas persisti en la partopreno de la kolektiva produkta laboro, same kiel la kadroj de Hijang-gubernio; 4) ĝi havas rapidan progreson kaj grandan efikon en baza konstruado de kampoj, agrikultura meĥanizado kaj scienca agrokulturado; 5) ĝiaj kolektivaj ekonomioj grandiĝas senĉese, la produkto kaj enspezo de ĝiaj malriĉaj komunumoj kaj brigadoj atingis aŭ superis la nunan nivelon de ĝiaj mezklasaj komunumoj kaj brigadoj; 6) ĝiaj agrikulturo, forstumo, brutobredo, flankokupoj kaj fiŝado ricevis plenampleksan disvolvon, akiris grandan pliprodukton kaj multe kontribuis al la ŝtato, kaj la vivo de ĝiaj komunumanoj pliboniĝas paŝon post paŝo.

# de Daĝaj en Batalo

**turo".** Ekde tiu tempo Daĝaj fariĝis lerninda modelo por la 700-miliona kamparanaro de Ĉinio.

Sed, la vojo por lerni de Daĝaj en agrikulturo estis ne glata.

### HISTORIA RETRORIGARDO

En la pasintaj pli ol 10 jaroj, ĉu lerni de Daĝaj aŭ opozicii al ĝi ĉiam estis la ĉefa enhavo de la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj en la ĉina kamparo. Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, ĉefoj de la reviziisma linio en la Partio, ĉiuj



*Guo Fenglian (la meza), la partifilia sekretariino de Daĝaj-brigado de Hijang-gubernio, Ŝanhi-provinco, laboras kune kun komunumanoj.*

La "kvarpersona bando" malamis kaj timis la movadon kaj ĉiamaniere klopodis por subfosi ĝin. Antaŭ la Unua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo la karieristino Giang King diris malice, ke "nun iuj en la Centra Komitato de la Partio provis fari Prezidanton Maŭ nominala prezidanto", kaj per tio alude atakis Ĉefministron Ĝoŭ kaj aliajn gvidantojn de la Centra Komitato. Ŝi eĉ postulis ke oni redonu en la konferenco la sonbendon de la parolado farita de ŝi ekster la konferenco kaj disdonu presaĵon de ŝia parolteksto por kaŭzi ĥaoson en la penso de la reprezentantoj. Informiĝinte pri tio, Prezidanto Maŭ severe kritikis Giang King pri ŝia parolado, dirante: **"Sensencaĵo, ŝia parolo estas tute ekster la temo de la konferenco."** Kaj li aparte instrukciis, ke oni **"ne disdonu ŝian paroltekston, nek presigu ĝin, nek redonu la sonbendon"**. Tio donis al Giang King fortan baton.

En la konferenco Kamarado Hua Guofeng faris resuman raporton en la nomo de la Centra Komitato de la Partio kun la titolo "La Tuta Partio Mobiliziĝu, Faru Grandan Klopodon por Disvolvi la Agrikulturon kaj Batalu por Ĝeneraligi la Daĝaj-tipan Gubernion". La raporto enkorpigis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj liajn politikojn, faris kompletajn analizon kaj resumon pri la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj elmetis grandiozajn celaĵojn kaj konkretajn rimedojn por laŭplane kaj laŭpaŝe konstrui Daĝaj-tipajn guberniojn kaj fundamente efektivigi agrikulturan meĥanizadon en la jaro 1980. Ĝi estis varme aprobita de la reprezentantoj. Tamen karieristino Giang King insultis ĝin, dirante ke "tiu raporto almenaŭ estas reviziisma". Kamarado Hua Guofeng persistis en la principo kaj ĝustatempe sendis la raporton al Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ sankciis la raporton kiu reprezentas la volon de la tuta ĉina popolo.

Forpuŝinte la ĝenadon kaj subfoson de la "kvarpersona bando", la Unua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo finiĝis en plena sukceso, kaj ĝi multe vigligis nian tutan popolon. Sub la inspiro de la raporto de Kamarado Hua Guofeng kaj la spirito de la konferenco, rapide leviĝis alta tajdo de la amasa movado de lerno de Daĝaj kaj ĝeneraligo de la Daĝaj-tipa gubernio tra la kamparo de la tuta lando. 1,600,000 kadroj de nia lando tiutempe organiziĝis en multajn laborgrupojn por ĝeneraligi Daĝaj-tipan gubernion, kiuj iris al la kamparo kaj tie faris edukon pri la partia fundamenta linio. La gvidantaroj de multaj regionoj disvolvis marksisman-leninisman memedukon — ordigon de la partiaj organizoj kaj ĝustigon de laborstilo. La vasta kamparanaro entuziasme kaj aktive sin ĵetis en la fundamentan konstruadon de kampoj. En tiu laboro partoprenis maksimume 150,000,000 personoj. Varma vigleco prezentiĝas ĉie en la kamparo.

## FRENEZA SUBFOSO

La "kvarpersona bando" ne akceptis sian malvenkon, kaj ĝi eĉ pli freneze kaj plenenergie atakis la fundamentan sperton de Daĝaj.

Kio estas la fundamenta sperto de Daĝaj? Pri tio Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj iam faris sciencan resumon: Persiste metu la proletan politikon kaj Maŭzedongpenson en la komandan lokon, persistu en la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj persistu en la komunisma moralo ami la ŝtaton kaj la kolektivon. En la konferenco Kamarado Hua Guofeng refoje emfazis tiun resumon de Ĉefministro Ĝoŭ en sia raporto kaj klare montris: "Konstrui Daĝaj-tipajn guberniojn signifas vastigi la fundamentan sperton de Daĝaj en la tuta lando." Li diris: "Fari edukon pri la partia fundamenta linio en la kamparo estas fundamenta garantio por konstrui Daĝaj-tipajn guberniojn." La eduko pri la partia fundamenta linio signifas tion, ke la diversnivelaj organizoj de la Partio senĉese edukas la kamparanojn per socialisma penso kaj kritikas kapitalisman penson por ke ili venku kapitalismon per socialismo.

La "kvarpersona bando" kriis revoluciajn sloganojn kaj sin ŝajnigis subtenanta Prezidanton Maŭ, sed fakte ili ĉiamaniere subfosis la revolucion kaj opoziciis kontraŭ Prezidanto Maŭ. Ili energie kalumniis ke Daĝaj estas "tipo de produkto", "postiĝis politike" ktp, intencante forhaki la ruĝan flagon Daĝaj persone starigitan de Prezidanto Maŭ kaj starigi sian flagon en servo al ilia intrigo por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj restaŭri la kapitalismon.

Por nei la sperton de Daĝaj, la "kvarpersona bando" energie oponis kontraŭ tio, ke oni faru edukon pri la partia fundamenta linio en la kamparo. Ili kalumniis ke tio estas "direkti la

*Sur la draŝejo de Huahi-brigado de Giangjin-gubernio, Giangsu-provinco*



lancpinton malsupren", kaj la ordigo de la partiaj organizoj kaj la ĝustigo de laborstilo en la kamparo estas "restaŭro kaj regreso". Ili oponis kontraŭ disvolvo de produkto, kaj kulpigis onin pri praktiko de la "teorio de produktaj fortoj". Ili eĉ kalumniis ke "oni scias nur fari la agrikulturan meĥanizadon sed ne revoluciigon". Estas multaj la absurdaj diroj de la "kvarpersona bando" pri opono kontraŭ lerno de Daĝaj, kiujn kamparanoj formulis en "tri oponojn kaj unu forhakon", nome opono kontraŭ forta kritiko al reviziismo, opono kontraŭ profunda kritiko al kapitalismo kaj opono kontraŭ energia klopodo por socialisma konstruado, kaj forhako de la ruĝa flago Daĝaj.

La "kvarpersona bando" instigis iujn kapti "potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon" de diversnivelaj institucioj intencante paralizi la instituciojn de la Partio kaj la ŝtato, konfuzi la penson de la popolo, detrui produkton, kaj malbonigi la vivon de la popolo, per tio ili provis faligi grandan nombron da gvidantoj partiaj, ŝtataj kaj armeaj de la centro kaj diversaj lokoj por efektivigi ilian kriman celon uzurpi en ĥaoso la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato.

## AKRA KONTRASTO

Ĉu lerni de Daĝaj aŭ oponi kontraŭ ĝi estas du malsamaj linioj, kiuj alportis du tute malsamajn rezultojn.


Daĝaj kaj la Daĝaj-tipa gubernio — Hijang faris rezolutan batalon kontraŭ subfosoj de la "kvarpersona bando" kaj per tio donis ekzemplon por la tuta popolo. Malgraŭ malhelpo de la "kvarpersona bando" la centmilionoj da kamparanoj kaj kadroj de la tuta lando senĉese puŝis la grandan movadon antaŭen. Puŝate de la eduko pri la partia fundamenta linio, la provincoj

*Huanghian-gubernio de Ŝandong-provinco akiris riĉan rikolton de greno.*



Ŝandong, Giangsu, Anhuj kaj aliaj rapide disvolvis sian agrikulturan produktadon. Ankaŭ nemalmultaj gubernioj, komunumoj kaj brigadoj en iuj regionoj serioze ĝenataj de la "kvarpersona bando" bojkotis tiun herezan venton, rezolute kaj senŝanceliĝe lernis de Daĝaj kaj akiris bonan rikolton.

Suĝoŭ-subprovinco en lerno de Daĝaj estas laŭdinda ekzemplo. Ĝi estas najbara al Ŝanhajo en la oriento kaj al Ĝegiang-provinco en la sudo. En tiuj lokoj freneze aktivadis la agentoj de la "kvarpersona bando". Sed Suĝoŭ-subprovinco ne estis ĵetita en ĥaoson, kaj male, ĝia sukceso en lerno de Daĝaj estas tre rimarkinda, kaj ĝia totala produktokvanto de greno en 1976 pliiĝis je 500,000,000 kg. ol tiu de 1975.



*Li Kimaŭ (la dekstra), la partifilia sekretario de Higubi-brigado de Hijang-gubernio, konstruas kanalon kune kun komunumanoj.*

Ankaŭ en Suĝoŭ estis agento de la "kvarpersona bando", kiu, kiel sia mastro, senbride kalumniis la edukon pri la partia fundamenta linio. Sed la gvidantoj kaj amasoj de la subprovinco unuanime kaj rezolute lernis de Daĝaj. Ili diris: "Ju pli forte vi subfosas, des pli energie ni laboras." La partia komitato de Giangjin-gubernio de tiu subprovinco deklaris al la kadroj kaj amasoj: La laborgrupoj ne nur ne devas retiriĝi, sed devas esti plifortigitaj; la eduko pri la partia fundamenta linio ne devas esti ĉesigita, sed devas esti plirapide kaj plibone plenumita; la celaĵo finkonstrui Daĝaj-tipan gubernion en unu jaro ne devas esti ŝanĝita, sed devas esti rezolute atingita. Vidinte sian subfoson malsukcesigita, la agento de la "kvarpersona bando" instigis iujn iri al Longkiaŭ, la avangarda brigado en lerno de Daĝaj, por fari tie malhelpon, sed ricevis solidan riproĉon de la kamparanoj. Komunumanoj diris indigne: "Vi faras nur subfosadon, sed ne fiziklaboron, ĉu la greno povas fali de la ĉielo?"

Samtempe, en Huanghian-gubernio de Ŝandong-provinco, eĉ iuj diris kalumnie ke "ju pli multe la gubernio produktas grenon, des pli granda estas ĝia krimo." Sed la kadroj kaj amasoj de la gubernio ne timis tian diron. Kiam la "kvarpersona bando" energie oponis kontraŭ la lernado de Daĝaj, la partia komitato de la gubernio decidis ke ĉiuj kadroj de Hiadinggia-brigado sub gvido de du vicsekretarioj de la gubernio refoje iru al Daĝaj por lerno. Reveninte, ilia entuziasmo por lerni de Daĝaj fariĝis pli alta. En la tuta gubernio oni varme elektis aktivulojn energie laborantajn por socialismo, forigis la herezan venton de opono kontraŭ Daĝaj kaj puŝis la movadon al nova etapo. Post unujara penlaboro, ĉiuj komunumoj de la gubernio fariĝis avangardaj unuoj, ĉiuj brigadoj havis rimarkindan ŝanĝiĝon, la tuta gubernio akiris bonan rikolton kaj ĉie prezentiĝis prospereco.

Sed Venĝoŭ-subprovinco de Ĝegiang-provinco estis tute malsama ekzemplo. Ĝi antaŭe estis loko abunda je fiŝoj kaj rizo. En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la loko ricevis rapidan progreson. Jam en 1970 la meznombra mua produktokvanto de greno atingis 450 kg. De post kiam la "kvarpersona bando" serioze malhelpis la movadon de lerno de Daĝaj, ĝia agrikultura produkto multe reduktiĝis. Agentoj de la "kvarpersona bando" tie diserigis la kolektivan



*Komunumanoj de Dangtu-gubernio, Anhuj-provinco, malkaŝas kaj kritikas krimojn de la "kvarpersona bando".*

ekonomion, nomis tiujn, kiuj distribuis kampojn al privata uzo de familioj, "revoluciuloj", sed nomis tiujn revoluciajn kadrojn, kiuj persiste iras la socialisman vojon, "potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon". Tio kaŭzis ĉie inundon de kapitalismo, multaj lokoj disdonis la kampojn al la familioj por privata uzo, la kolektiva ekonomio diseriĝis, koruptiĝo, ŝtelado kaj spekulado furiozis ĉie, de tio la vasta kamparanaro falis en profundan mizeron. Ili indigne diris: "La 'kvarpersona bando' neniom estas reprezentantoj de la 'ĝusta linio', ili komplete perfidis la intereson de la laboranta popolo kaj estas centpocenta bando fatala al la ŝtato kaj la popolo, kaj ili antaŭen puŝis efektive kontraŭrevolucian reviziisman linion ekstreme dekstran."

## GRANDA VENKO

La krimoj de la "kvarpersona bando" estas nekalkuleblaj. La Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua faligis ilin kaj per tio forigis la plej grandan barilon por lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de Daĝaj-tipaj gubernioj. En decembro de la lasta jaro, laŭ la propono de Prezidanto Hua la Centra Komitato de la Partio venke okazigis la Duan Tutlandan Konferencon por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo. 5,000 reprezentantoj venintaj el la diversaj lokoj de la tuta lando varme laŭdis la saĝan gvidanton Prezidanton Hua, indigne malkaŝis kaj kritikis la "kvarpersonan bandon", retrorigardis la iritan vojon de batalo kaj interŝanĝis sperton.

Nur pli ol unu jaro forpasis de la unua konferenco ĝis la dua, sed ĝi estas neordinara. En tiu tempo la 700-miliona kamparanaro batalis kontraŭ la "kvarpersona bando" kaj seriozaj naturaj plagoj kaj gajnis bonan rikolton de la 15-a sinsekva jaro. En tiu jaro la movado por ĝeneraligi Daĝaj-tipan gubernion atingis grandan sukceson. La antaŭaj 317 avangardaj gubernioj en lerno de Daĝaj pluapaŝe fortikiĝis, kaj aliaj pli ol 100 gubernioj paŝis en la vicaron de la avangardaj gubernioj en lerno de Daĝaj.


Nun, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua kaj inspirate de la spirito de la Dua Tutlanda Konferenco por Lerni de Daĝaj en Agrikulturo, la kadroj kaj amasoj sur la agrikultura fronto de nia lando decidis per ankoraŭ pli granda energio puŝi la movadon de ĝeneraligo de Daĝaj-tipa gubernio al nova tajdo kaj akcelis per tio la tutan nacian ekonomion.

HONG TONG:

# Petrola urbo en granda progresado

En la unua bazloko de petrola industrio de nia lando — Jumen de Gansu-provinco, aperis bonega situacio de la revolucio kaj produktado en la lasta tempo, kiam ni aklamis ke la Komunista Partio de Ĉinio denove havas sian gvidanton kaj varme celebris la grandan historian venkon ke la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng frakasis la intrigon de la kvarpersona kontraŭrevolucia kliko uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Por celebri la venkojn kaj kritiki la krimojn de la kliko, la laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj skribis dekmilon da dazibaŭ-oj kaj okazigis milon da kunvenoj. Kuraĝigate de la du ĝojigaj informoj la laboristoj kaj oficistoj kun pli alta entuziasmo kaj revolucia energio kreis novajn atingojn kaj superplenumis en la jaro 1976 la ŝtatan planon de la totala produktovaloro, produktokvanto kaj prilabora kvanto de nafto kaj aliaj ĉefaj produktaj normoj.

Jumen estas malnova petrolkampo ekspluatata jam 38 jarojn kaj estis rigardata de iuj kiel preskaŭ "elĉerpita". Sed en la Granda Proleta Kultura Revolucio, sub la gvido de la partia komitato de la petrolkampo, la laboristoj plenumis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, disvol-




Teksto de **Hiaŭven** kaj **Donghiaŭ**
Pentrita de **Vej Ĝiĵen**




Irinte al la kamparo por lerni agrikulturan scion en fizika laboro, Hiaŭjing vidis, ke tie bole disvolviĝas la movado "lerni de Daĝaj en agrikulturo".

vis la amasan movadon de lerno de Daking en industrio kaj bone aplikis produktajn rimedojn por stabiligi premforton de la petrolkampo, plivastigi ĝian areon kaj levi la produktokvanton jaron post jaro. Dank' al tio la malnova petrolkampo efektivigis stabilan pliproduktadon en sinsekvaj sep jaroj kaj faris sian kontribuon por disvolvi la petrolan industrion de Ĉinio.

Retrorigardante la iritan vojon, la laboristoj de Jumen-petrolkampo plej bone konas kiel teni la revolucion kaj stimuli la produktadon kaj kian gravan signifon havas la bona produktado por la socialismo.


Frue en la jaro 1959, kiam la patrolando urĝe bezonis petrolon kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko perfide nuligis la kontraktojn kun nia ŝtato kaj retiris siajn specialistojn, la laboristoj kaj kadroj de la petrolkampo laboris peneme en malfaciloj por pliprodukti petrolon kaj malpezigi la ŝarĝon sur la ŝtato kaj tiel faris sian kontribuon por la socialisma konstruado.

Kun la rapida disvolviĝo de la petrola industrio de nia lando, konstruiĝis novaj petrolkampoj unu post aliaj. Jumen-petrolkampo elsendis grandan nombron da laboristoj kaj kadroj kaj plej bonajn ekipaĵojn al ili. Dum pli ol dek jaroj, la nombro de la elsenditaj laboristoj kaj teknikistoj egalas al kvaroblo de la nunaj kaj tiu de la elsenditaj ekipaĵoj al 75% de la nunaj. La laboristoj, sub la gvido de la partia komitato de la petrolkampo, ĉiamaniere fosis latentajn fortojn kaj disvolvis la produktadon. Bajjanghe estas la plej malgranda el la petrolkampoj de Jumen, sed ĝia revolucia spirito estas miniaturo de la tuta Jumen. En la jaro 1970, ĝia partia komitato decidis ekspluati novan petrolregionon. Por frue kaj multe produkti nafton la laboristoj propramane faris bormaŝinon ne atendante ekipaĵojn sendotajn de la ŝtato. En frosta vintro ili piediris tra la tuta Jumen-petrolkampo por trovi utiligeblaĵojn el forjetitaj materialoj kaj faris kompleton da putobora ekipaĵo. Per tiu bormaŝino ili sukcesis bori 25 putojn dum pli ol unu jaro, kies longeco egalas al tiuj de Jumen-petrolkampo en dek jaroj antaŭ la Liberiĝo, kaj plivastigis la areon de la petrolkampo je 56% kaj altigis tagan produktokvanton je 54%.

La laboristoj de Jumen kiel mastroj de la petrolkampo senĉese klopodis por multe fari




Reveninte al la lernejo ŝi fondis sterkajkolektan grupon por subteni agrikulturon.



Dimanĉe la grupanoj portas sian kolektitan sterkajon al la brigado ĉe antaŭurbo.

kontribuon por la revolucio. Tamen la "kvarpersona bando" kalumniis, ke la laboristoj nur scias produktadon, intencante kulpigi ilin pri tio. En la kritikaj kunvenoj laboristoj diris indigne: "La ŝtato bezonas petrolon. Ĝia produktado strikte ligiĝas kun la socialismaj revolucio kaj konstruado. Ni produktas petrolon multe kaj bone, kiel tio fariĝis kulpo? Ni devas severe diri al la 'kvarpersona bando': Energie labori por socialismo estas laŭdinde. Kiu ne tiel faras, posedas neniom da Marksismo."

Ligante sian praktikon la membroj de la partia komitato kaj la revolucia komitato de la petrolkampo Jumen forte kritikis la reakcian absurdaĵon de la "kvarpersona bando", ke "la produkto nature altiĝus, se la revolucio estus bone farita". La vicsekretario de la partia komitato Vang Deli diris: "Ĉiujare nia produkto leviĝis kaj nia plano plenumiĝis ne spontanee, sed tio rezultis el la energia laborado de la laboristoj, kiuj sekvas la instruon de Prezidanto Maŭ **'teni la revolucion kaj stimuli la produktadon'.** Por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato kaj restaŭri kapitalismon, la 'kvarpersona bando' timis, ke ni bone kondukas produktadon. Svingante la grandan bastonon de 'teorio de produktaj fortoj' ili celis ne nur detrui la produkton, sed ankaŭ pereigi la Partion kaj la ŝtaton."

En la lastaj jaroj, la partia komitato de Jumen-petrolkampo serioze plenumis la grandan principon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produktadon"** kaj ĝuste traktas la rilaton inter la revolucio kaj la produktado, tiel ke la socialisma aktiveco de la vastaj amasoj bone disvolviĝis, diversaj produktaj procesoj estis bone aranĝitaj, ĉiuj teknikaj rimedoj estis glate efektivigitaj kaj la tuta produktado iris normale.

Nuntempe, la heroaj laboristoj de Jumen-petrolkampo decidis kompakte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng, pluapaŝe disvolvi la bonegan situacion, pli bone konduki la revolucion kaj produktadon de la petrolkampo kaj fari kontribuon por konstrui Ĉinion en potencan socialisman landon kun modernaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, scienco kaj tekniko.



Survoje ĉe la vilaĝrando Hiaŭjing renkontis sian onklinon, kiu surŝutas ĝuste novan kolektaĵon sur sian privatan sterkamason.



La onklino kun egoisma koro instigas sian nevinon kaj aliajn meti la portitan sterkaĵon sur tiun amason, dirante, ke tiu estas de la brigado.

# Luojang-a Ŝosea Ponto super la Flava Rivero

En la meza baseno de la Flava Rivero oriente de Sanmenhia de Henan-provinco de nia lando troviĝas nove konstruita ŝosea ponto, kun longeco de 3,428.9 metroj super la rivero. Ĝi aldonis novan brilecon al la Flava Rivero.

Sur la ponto oni povas vidi malproksimen Mangŝan-montaron sur la suda bordo, kiu etendiĝas 400 kilometrojn kaj la montarojn Tajhang kaj Vangvu impone starantajn sur la norda bordo. La loko estas tre grava, tamen tre malfacile trairebla. En la pasinteco, por transpasi la riveron oni devis iri al Ĝengĝoŭ pli ol 100 kilometrojn fore, kie estis ponto. Kun disvolviĝo de la socialisma konstruado la popolo de ambaŭ bordoj tie forte deziris ponton.


Finfine venis ĝojiga informo. En novembro de 1973, komenciĝis la konstruado de la Luojang-a Ŝosea Ponto super la Flava Rivero. La ĝojaj popolanoj de ambaŭ bordoj aktive anoncis sin por partopreni en la konstruado de la ponto.



La grupanoj elkorbigis tie sian tutan portaĵon unu post alia.



Hiaŭjing informiĝis, ke la sterkamaso ne estas de la brigado.




*Luojanga Ŝosea Ponto super la Flava Rivero*

Printempe de 1974, kiam la konstruantoj streĉe laboris en neĝo kaj frosto, la "kvarpersona bando" de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ formis sian propran sistemon post la dorso de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, agitis burĝan sektismon sub la ŝildo de la kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio por spliti la laboristan vicaron kaj levis en la konstruejo he-



Trovinte sin trompita, Hiaŭjing tuj iris al la hejmo de la onklino.



Hiaŭjing diris: "Onklino mia, vi ne devis trompi nin ruĝgvardianetojn!. . ."

rezan venton tiri "Konfucion" el ĉiugradaj gvidantoj, kio multe malrapidigis la pontokonstruadon. De la jaro 1976, sub la preteksto de rebato al la dekstra deviaciismo celanta renversi la ĝustajn verdiktojn la "kvarpersona bando" ĉie faris agitadon. En la konstruejo iuj klopodis por spliti laboristaron dirante, ke ili eltiros ĉiujn grandajn kaj malgrandajn enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, kaj kulpigis aliajn per "teorio de produktaj fortoj" kaj "meti produkton super revolucion" ktp.

Sub la gvido de la partia komitato de la konstruejo la pontokonstruaj laboristoj kaj popolanoj batalis pinto-kontraŭ-pinte kontraŭ ĝenado kaj subfoso de la "kvarpersona bando". Ili elmetis sloganon "studi teorion, teni linion, kaj efektivigi stabilecon kaj unuiĝon por stimuli konstruadon" kaj persistis en laborposteno. Ili decidis ne vanigi la esperon de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ. Ili diris, ke Prezidanto Maŭ alvokis ilin streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie, kaj estas por ili glore tion fari plenenergie.

Ĝuste kiam la konstruado iris streĉe, venis aparte granda ĝojiga informo pri nomumiĝo de Kamarado Hua Guofeng kiel prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Milita Komisiono de CK de KPĈ kaj pri frakaso de la kontraŭpartia kliko de Vang, Ĝang, Giang kaj Jaŭ fare de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua Guofeng en unu bato. La pontokonstruejo ekbolis de ĝojo. Oni varme aklamis la saĝan gvidanton Prezidanton Hua kaj indigne kondamnis la krimojn de la "kvarpersona bando" pri uzurpo de gvidanteco de la Partio kaj la ŝtato. La socialisma aktiveco de la vastaj amasoj de laboristoj kaj kadroj elŝprucis kvazaŭ erupcianta vulkano. Ili decidis reakiri la tempon perditan pro ĝenado kaj subfoso de la "kvarpersona bando". Malgraŭ frosto la laboristoj kun plena energio plenumis transpontadon de kvin spanoj en unu tago anstataŭ de du spanoj laŭ la plano. La ponto finkonstruiĝis antaŭ la nova jaro 1977, kaj oficiale malfermiĝis al trafiko en la dua de januaro.



Helpate de Hiaŭjing la onklino konfesis sian malpravon.




Ĉiuj tutkore amas la kolektivon kaj portas sterkaĵon al la Daĝaj-tipaj kampoj de la brigado.




# Ŝellakajo de Fuĝoŭ

de **HIAŬ JI**



*Bambua florvazo*

LA ŝellakajo de la urbo Fuĝoŭ de Fugian-provinco estas unu el la fame konataj valoregaj metiartaĵoj de Ĉinio, kaj havas historion de pli ol 200 jaroj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la metiartistoj kuraĝe kreas novon sur la bazo de disvolvo de la tradicia metiarto, multe reformis la teknikon kaj altigis la kvaliton de produktaĵoj, tiel ke la antikva arto nun disradias novajn brilojn.

La ŝellakajo de Fuĝoŭ famas pro la gracieco de sia figuro, la malpezeco de sia korpo, la nelukseco de siaj koloroj kaj la delikateco de la farado. Produktado de ĉiu lakajo bezonas kelkdek procedojn. Jen la metodo por ĝin produkti: unue fari modelon laŭ la desegno zorgeme farita; poste alglui sur la modelo plurajn tavolojn da lina ŝtofo per lako, kaj, post sekiĝo en ombro, depreni la modelon kaj laki la internan surfacon; kaj fine plurfoje ĝin zorgeme glatigi, poluradi, laki kaj ornami, tiel ke la artaĵo estas ĉiam brila kiel spegulo.


En la lastaj jaroj, la metiartistoj de la Fuĝoŭ-a Lakaĵa Fabriko kreis novan teknologion de apliko de rubenkolora lako kaj interna diafana desegnaĵo. Ekz. la lakaĵo kun orfiŝoj interne desegnitaj estas farita per jena metodo: oni unue desegnas orfiŝojn sur polurita kruda lakaĵo kaj poste ŝmiras maldikan tavolon da travidebla lako sur ĝi. Dank' al tia aranĝo desegnaĵo de orfiŝoj aspektas pli versimila.

Ankaŭ la specoj de la lakaĵoj plimultiĝis en la lastaj jaroj kaj nun jam atingis pli ol 1,000. Tiu metiarto iom post iom kombiniĝas kun modernaj industrioj kaj arkitekturo, krom fari ordinarajn ornamaĵojn kiel ekranojn, bildpendaĵojn kaj diversajn bestofigurojn, kaj ĉiutagajn bezonaĵojn kiel diversajn skatolojn kaj vazojn. La instrumentaj paneloj kaj internaj akcesoraĵoj de la aŭtomobilo "Ruĝa Flago" kaj kestoj de belaj radioriceviloj kun nacia gusto estas faritaj per tiu tradicia metiarto.

La prospereco en la nuna produktado de ŝellakaĵoj rememorigas al maljunaj artistoj de tiu metio pri la pasinteco. En la malluma malnova socio tiajn tradiciajn lakaĵojn

faris nur individuaj metiejoj kun malbonaj laborkondiĉoj; tiam la metiartistoj suferis de ekspluatado kaj vivis en mizereco. Antaŭ la vespero de la Liberiĝo restis en la urbo nur pli ol 200 tiaj metiistoj. Post la Liberiĝo la metiarto de ŝellakajo rejuniĝis kaj vigle disvolviĝis. En Fuĝoŭ la ŝtato fondis du fabrikojn, kiuj havas po pli ol mil personojn, kaj instituton pri lakartaĵoj. La maljunaj metiartistoj ĝuas multan zorgon de la Partio kaj respekton de la popolo. Ilia vivo estas feliĉa kaj ilia arto plene disvolvita. Maljuna metiartisto Li Ĝiking, kiu sin okupis pri tiu metio jam pli ol 60 jarojn, estis elektita kiel membro de la Tutlanda Popola Kongreso kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanton Maŭ. Li diligente laboras super sia metio, kreis ĉ. 100 specojn de ornamaj koloriloj kaj faris sian kontribuon en disvolvo de ŝellakaja arto. Li sukcese kreis lakajn ornamaĵojn similajn al antikvaj fajencaĵoj kaj bronzaĵoj kaj notis sian sperton akumulitan en arta praktikado por gvidi metilernantojn.

La Granda Proleta Kultura Revolucio plie vekis ĉe la maljunaj kaj junaj metiartistoj altan socialisman aktivecon. Sub direkto de la revolucia literatura kaj arta principo de Prezidanto Maŭ **"kune floru cent floroj"** kaj **"elŝovu novon el malnovo"**, ili kritikas la reviziisman literaturan kaj artan linion kaj pli rapide puŝas la disvolvon de tiu tradicia metiarto.



*Veterana metiisto Li Ĝiking (la maldekstra) kaj aliaj laboristoj en desegnado*

*Ekzamenado de ŝellakajoj*






# La Aĉang-oj

de ZONG MIN

La aĉang-nacieco kun 18,000 membroj loĝas en la gubernioj Longĉuan, Lianghe kaj Luhi de la Dehong-a Taj-Ĝingpo-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Junnan, kaj 90% de la aĉangoj loĝas en Husa-komunumo de Longĉuan-gubernio kaj komunumoj Ĝedaŭ kaj Daĉang de Lianghe-gubernio.

La aĉangoj estas nacieco kun tre longa historio. En antikva hanlingva historia verko jam troviĝis notoj pri la aĉangoj. En la dua jarcento a. K., la prapatroj de la aĉangoj loĝis en la basenoj de la riveroj Ginŝa, Lancang kaj Nugiang de nordokcidenta Junnan, kaj poste transloĝiĝis suden kaj fiksloĝiĝis en la gubernioj Longĉuan kaj Lianghe en la 13-a jarcento.

Depost la kvina jarcento, disfalis la sistemo de primitiva komunumo de la aĉangoj kaj ekaperis klasoj. Tiam ĝia agrikulturo ricevis plian disvolviĝon kaj ĝia brutobredado estis relative prospera. Depost la oka jarcento, la aĉanga regiono apartenis al la lokaj registaroj de Nanĝaŭ kaj Dali kaj per armaj fortoj la sklavmastroj de Nanĝaŭ faris kruelajn ekspluatadon kaj sklavigadon al la aĉangoj. En la fino de la 14-a jarcento kaj la meza parto de la 15-a jarcento, Ming-dinastio starigis regsistemon de lokaj ĉefoj en la aĉanga regiono. Post la Revolucio de 1911, militaristo de Junnan starigis tie sian registaron kiu en koluzio kun la lokaj ĉefoj plifortigis la subpremadon kaj ekspluatadon al la aĉanga popolo.

Por oponi kontraŭ la subpremado kaj ekspluatado de la reakcia reganta klaso, la aĉanga popolo faris longan malcedeman bataladon. Frue en 1793, la aĉanga popolo faris arman insurekcion kaj mortigis la reakcian lokan ĉefon. En 1856, aĉangaj popolanoj partoprenis en la insurekcio de la popolo de Dali k.a. kontraŭ la regado de King-dinastio. En 1909, la aĉanga popolo partoprenis en la arma insurekcio de Ganja kontraŭ King-dinastio. En 1949, la reakciaj lokaj feŭdaj servutulmastroj alprenis kontraŭrevoluciajn rimedojn kiel konskripcii unu el la du aŭ du el la tri servaĝaj viroj de ĉiu familio por rezisti kontraŭ la revolucia ŝtormo de la Liberiga Milito de la popolo, kaj la aĉanga popolo senŝanceliĝe bojkotis tion. En la komenco de 1950, aĉangaj popolamasoj sieĝis la oficejon de la loka reganto, mortigis lin kaj sendis delegiton al la liberigita Tengĉong-regiono por bonvenigi la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon.

En la komenco de 1950, la Ĉina Popola Liberiga Armeo marŝis en Dehong-regionon kaj la aĉanga popolo liberiĝis. Sub la brilo de la nacia politiko de Prezidanto Maŭ, fondiĝis en 1952 la Aĉanga Aŭtonoma Distrikto en Husa de Longĉuan-gubernio en kiu loĝis multaj aĉangoj. Laŭ la karakterizaĵoj de la aĉanga socio kaj la konkretaj kondiĉoj de la landlima regiono, ekde 1955 la Partio disvolvis en la aĉanga regiono movadon de agrara reformo kun paca interkonsiliĝo, similan al tiu en la taj-nacieca regiono en najbareco, kaj abolis la feŭdan terposedan sistemon. Ankaŭ la privilegioj de la feŭdaj mastroj kaj bienuloj kaj uzuro estis nuligitaj. Surbaze de la venko de tiu movado disvolviĝis la agrikultura koopera movado kaj en 1958 efektiviĝis agrikultura kooperigo. En 1969, kiam grandan venkon gajnis la Granda Proleta Kultura Revolucio, popolaj komunumoj fondiĝis en la aĉanga regiono. Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la aĉanga popolo marŝas laŭ la brila socialisma vojo kun arda entuziasmo kaj granda energio. En la pasintaj pli ol dudek jaroj, profunda ŝanĝo okazis en la aĉanga regiono.

La laborema kaj kuraĝa aĉanga popolo de longe estas fame konata kiel lertuloj en kulturado de rizo. Ilia rizo estas de multaj specioj kaj bona kvalito kaj la specio Haŭangong de Lianghe estis laŭde nomata Reĝo de Rizoj. Post la fondo de popola komunumo, Binggiebrigado de Ĝedaŭ-komunumo de Lianghe-gubernio energie faris akvoutiligan konstruadon en la amasa movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo kaj fosis tri irigaciajn kanalojn kun totala longeco de 17 kilometroj kaj plivastigis la areon de akvokampoj de pli ol 110 hektaroj en 1966 al pli ol 310 hektaroj. Husa-komunumo de Longĉuan-gubernio konstruis 9 akvokonservejojn kaj pli ol 20 irigaciajn kanalojn, kiuj povas irigacii pli ol 800 hektarojn da kampoj. Kvankam en

1972 okazis serioza sekeco, tamen la totala produktokvanto de greno de tiu jaro estis je 2,000 tunoj pli granda ol tiu de 1958, kaj je 15% pli granda ol tiu de 1971. Post la fondiĝo, tiu komunumo plantis multajn aleŭritojn, kaŝtanarbojn kaj pomarbojn, bredis multajn bovojn, ĉevalojn, mulojn, ŝafojn kaj porkojn kaj fosis 50 fiŝbredajn lagetojn. Vere prosperas ĝiaj agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝbredado kaj flankaj okupoj. Kaj krome, la komunumo konstruis du hidroelektrejojn de 120 kaj 30 kilovatoj, aĉetis 15 traktorojn, 16 rizsenŝeligilojn kaj 8 dizelojn.

La delikate tranĉita kaj bonodora tabako produktita de aĉangoj de Husa de Longĉuan-gubernio estas fame konata. Sed antaŭ la Liberiĝo la produktokvanto de ĝi estis nur iom pli ol 5,000 kg. kaj ne sufiĉis por plenumi la bezonon de la loko. Post la Liberiĝo, pligrandiĝis la areo de la tabakaj kampoj kaj la produktokvanto de ĝi, kaj dank' al tio la komunumo povas enspezi sufiĉe grandan sumon. Pli menciinda estas ĝia alia fama produkto, nome tranĉiloj de Husa kun historio de pli ol 500 jaroj. La nomitaj tranĉiloj estas akraj, fortikaj, multspecaj kaj elegantaj, kiuj vendiĝis grandkvante ankaŭ al najbaraj tajoj, ĝingpooj kaj benglungoj, kaj eĉ malproksime al lisuoj en lokoj en la baseno de Nugiang-rivero, vaoj de Lincang, tibetanoj de Ĝongdian kaj loĝantoj de Birmo. Antaŭvespere de la Liberiĝo, la tranĉilfarada metio de la aĉangoj agoniis pro manko de materialo kaj peza imposto. Post la Liberiĝo, dank' al helpo de la ŝtato kaj kolektiva entreprenado, la produktado de husaaj tranĉiloj rejuniĝis kaj la nombro de specoj de la produktaĵoj pliiĝis de pli ol 30 al pli ol 50 kun pli ol 120 varioj.

Dank' al unueca planado kaj forta subteno de la ŝtato, la industrio de la aĉanga regiono multe disvolviĝis. Nongguang-karbominejo funkciigata de aĉangaj kaj alinaciecaj laboristoj estas nova bazo de hejtaĵo en la Dehong-a Taj-Ĝingpo-nacieca Aŭtonoma Subprovinco. En Longĉuan kaj Lianghe fondiĝis malgrandaj fabrikoj de feraĵoj, agrikulturaj instrumentoj, olepremado, sapoj, rezino kaj tinkturado. Ankaŭ la aferoj de eduko, kulturo, higieno, trafiko, poŝto, telefono kaj telegrafo de tiu regiono ricevis grandan disvolviĝon, kaj la infanoj de la aĉangoj povas viziti lernejon senpage.

La aĉangoj praktikas monogamion kaj iliaj malgrandaj familioj estas patriarkaj. La gejunuloj povas libere amindumi kaj ĝenerale junulo kaj junulino de sama familia nomo ne geedziĝas. La viroj kutimas porti bluan, blankan aŭ nigran jakon kaj nigran pantalonon. La kostumoj de la virinoj varias laŭ la lokoj, ĝenerale la edziniĝintaj portas jupon kaj longan jakon kun malvastaj manikoj, dum la fraŭlinoj portas pantalonon. La aĉangoj havas tre riĉan buŝan literaturon kiel popolkantojn, rakontojn kaj anekdotojn. Ili havas sian propran parolan lingvon sed ne sian skriban lingvon. Pro longtempa vivado inter hanoj kaj tajoj, ili ĝenerale scipovas la tajan kaj hanan lingvojn kaj uzas la hanan skriban lingvon.






Ĉiu ajn lando aŭ nacio en la mondo havas sian historion, siajn pasintecon kaj nuntempon.

Ĉinio estas unu el la landoj kun plej longa historio kaj plej frua civilizacio en la mondo. Ĝi estas unueca multnacieca lando formita antaŭ pli ol du mil jaroj. En la longaj produktado kaj klasbatalo, la prapatroj de la ĉina nacio en la primitiva socio, sklava socio kaj feŭda socio, kreis kaj disvolvis agrikulturon, metian industrion kaj brilan eminentan kulturon.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong montris: **"La ĉina nacio ĉiam estis granda, brava kaj diligenta kaj posteiĝis nur en la moderna epoko. Tiu posteiĝo rezultiĝis tute pro la subpremado kaj ekspluatado fare de imperiismaj landoj kaj enlandaj reakciaj registaroj."** Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo faris longan kaj malfacilegan bataladon, renversis la tri montojn de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo pezantajn sur ĝi, ŝanĝis sian postiĝintecon kaj starigis socialisman novan Ĉinion kun unuapaŝa prospereco en la Oriento de la mondo.

La hodiaŭa Ĉinio disvolviĝis el la pasinta Ĉinio. Por koni la hodiaŭon de Ĉinio, oni devas koni ĝiajn hieraŭon kaj antaŭhieraŭon,

# La moderna historio de Ĉinio

precipe ĝian modernan historion, la hieraŭon de Ĉinio.

La moderna historio de Ĉinio ordinare ampleksas la historian periodon de la malnova demokratia revolucio de Ĉinio komencita de la Opia Milito en 1840 ĝis la Movado de la 4-a de Majo en 1919. En tiuj preskaŭ 80 jaroj, la ĉina socio multe ŝanĝiĝis kaj plenis de senprecedence intensaj kaj komplikaj kontraŭdiroj kaj bataloj. Kun senkomparaj revolucia spirito kaj heroeco, la ĉina popolo batalis kontraŭ imperiistoj kaj iliaj lakeoj —la ĉinaj reakciaj fortoj kaj skribis per tio superban ĉapitron en la ĉina historio.

En 1840 Britio faris la agresan Opian Militon kontraŭ Ĉinio kaj per tio komenciĝis la moderna historio de Ĉinio. Antaŭ tiu milito, kvankam kapitalismo jam ekĝermis en la ĉina socio, tamen la socio ankoraŭ restis feŭda. Post tiu milito, Ĉinio fariĝis paŝon post paŝo duonkolonia kaj duonfeŭda socio pro la imperiisma agreso. Ŝanĝiĝis la naturo de la ĉina socio, ŝanĝiĝis ankaŭ la klasaj interrilatoj kaj la ĉefa kontraŭdiro de la socio. Antaŭ la Opia Milito, la ĉefa kontraŭdiro de la ĉina socio estis tiu inter la bienularo kaj la kamparanoj; post tiu milito, la bienula klaso plue kruele ekspluatis kaj subpremis la kamparanojn kaj fariĝis la ĉefa apogilo de imperiismo en regado super Ĉinio. Sekve de la ŝanĝiĝo de la sociaj ekonomiaj interrilatoj, naskiĝis novaj klasoj, nome la proletaro kaj burĝaro de Ĉinio. Ekde sia naskiĝo, la ĉina proletaro suferis trioblan subpremon de imperiismo, burĝaro kaj feŭdaj fortoj, kaj estas la plej revolucia klaso. En la duonkolonia kaj duonfeŭda socio, la kompradora burĝaro rekte servis al la imperiistoj, ĝi estis klaso bredata de ili kaj unu el la objektoj de la ĉina revolucio. Iom malsama estis la nacia burĝaro. Ĝi estis kaj subpremata de imperiismo kaj katenata de feŭdismo, tial kontraŭdiro ekzistis inter ĝi en unu flanko kaj imperiismo kaj feŭdismo en alia flanko, kio decidis ke ĝi povis partopreni en la revolucio. Aliflanke, pro ĝia malforteco en ekonomio kaj politiko, ĝi havis certajn rilatojn kun imperiismo kaj feŭdismo, tial mankis al ĝi kuraĝo ĝisfunde batali kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, kaj tio decidis ĝian kompromisan tendencon al la malamiko de la revolucio. La granda ŝanĝiĝo de socia naturo kaj klasaj interrilatoj de moderna Ĉinio kaŭzis akregajn kaj komplikajn klasajn kontraŭdirojn kaj batalojn. Plue ekzistis la kontraŭdiro inter feŭdismo kaj la popolamasoj, kaj aldoniĝis al ĝi la kontraŭdiro inter imperiismo kaj la ĉina nacio. Ili estis la du ĉefaj kontraŭdiroj de la ĉina moderna socio, kaj tiu inter imperiismo kaj la ĉina nacio estis la plej ĉefa el ĉiuj kontraŭdiroj. La granda revolucio de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo estiĝis kaj disvolviĝis ĝuste sur la bazo de tiuj kontraŭdiroj.

Imperiismo estis la plej ĉefa kaj feroca malamiko de la ĉina popolo en la moderna epoko. Depost kiam Britio faris la hontindan Opian Militon kaj malfermis la pordon de la feŭda Ĉinio per militŝipoj kaj kanonoj, imperiistoj senĉese faris agresajn militojn kontraŭ Ĉinio, kiel ekzemple, la agresan militon kune faritan de Britio kaj Francio en 1857, la agresan militon de Francio kontraŭ Ĉinio en 1884, la agresan militon de Japanio kontraŭ Ĉinio en 1894, la agresan militon kune faritan de la imperiismaj landoj Britio, Usono, Germanio, Francio, Rusio, Japanio, Italio kaj Aŭstrio en 1900, la armitajn invadojn de Japanio al Tajvan-provinco de Ĉinio en 1874 kaj 1895, la armitajn invadojn de Britio al la ĉina Tibeto en 1888 kaj 1903 kaj la plurajn armitajn intervenojn kaj invadojn de la cara Rusio al ĉinaj landlimaj regionoj. Per la armitaj invadoj, tiuj agresaj rabistoj devigis Ĉinion subskribi malegalajn traktatojn, okupis ĉinan teritorion, kaptis politikajn, ekonomiajn, militajn kaj kulturajn privilegiojn kaj tirane agis laŭplaĉe sur la ĉina tero.

Inter tiuj agresantoj, la cara Rusio estis la imperiisma rabisto kiu plej multe rabis ĉinan teritorion. En nur duona jarcento ekde la kvindekaj jaroj de la 19-a jarcento, ĝi okupis pli ol 1,500,000 kvadratajn kilometrojn da ĉina teritorio. Daŭrigante la aktivadon de la malnovaj caroj, nun la sovetunia social-imperiismo fabrikis diversajn absurdajn argumentojn kaj senĉese provokis landlimajn konfliktojn intencante fari plian agreson kaj ekspansion kun avido al ĉina teritorio. Sed antaŭ la stariĝinta ĉina popolo, la freneza ambicio de la nova caro estas nur songo.

La agresado de imperiismaj landoj alportis al la ĉina nacio grandegajn katastrofojn. Ili dividis Ĉinion en siajn influajn sferojn, laŭvole starigis garnizonojn, funkciigis fabrikojn kaj bankojn en Ĉinio, regis la doganon, eksteran komercon kaj havenojn de Ĉinio kaj faris kulturan agreson pere de fondo de preĝejoj, ĵurnaloj kaj lernejoj. Sub la agresado kaj kruela regado de imperiismo, la sendependa Ĉinio fariĝis duonkolonia kaj duonfeŭda lando tute sendefenda. La moderna historio de Ĉinio estas historio pri la agresado de imperiismo al Ĉinio kaj la sangaj krimoj de ĝia subpremado al la revolucio de la ĉina popolo kaj ĝia sklavigado al la ĉina popolo.

La imperiisma agreso vekis fortan kontraŭstaron de la ĉina popolo, kiu tre amas liberon kaj havas gloran revolucian tradicion. Ĝi neniam volis submetiĝi al la mallumа reakcia regado de imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Ekde la Opia Milito la ĉina popolo faris neflekseblajn kaj senĉesajn batalojn kontraŭ la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. La procezo de transformado de Ĉinio en duonkolonion kaj kolonion fare de imperiismo en kunligo kun ĉina feŭdismo estas ankaŭ tiu de la batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La batalado montris, ke la ĉina popolo havas la heroecon sange batali ĝisfine kontraŭ siaj malamikoj. La moderna historio de Ĉinio estas brila historio de la batalado de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo.

La revolucio de la Tajping-a Ĉiela Regno, la patriota kontraŭimperiisma movado de Jihetuan kaj la Revolucio en 1911 gvidata de Sun Jatsen estis tri altaj tajdoj de revolucio en la moderna historio de Ĉinio.

Sub la gvido de la kamparana revolucia gvidanto Hong Hiukjuan la revoluciaj herooj de la Tajping-a Ĉiela Regno organizis sian potencan revolucian armitan forton, insurekciis ĉe Gintian-vilaĝo de Gujping-gubernio, Guanghi en suda Ĉinio en 1851, konkeris Nankinon en 1853, fondis tie revolucian regpotencon kaj persistis en batalado dum 14 jaroj, kio donis fortajn batojn al la feŭda reakcia regado de King-dinastio. Antaŭ la eksterlandaj agresantoj ili montris neniom da timo kaj faris heroan bataladon kontraŭ ili. La heroa batalado kaj venko de la Tajping-a armeo super la fusilistaj trupoj organizitaj de la imperiismaj landoj Usono, Britio kaj Francio forte subpremis la arogantecon de la agresantoj kaj rakontoj pri tio cirkuladis inter la ĉinaj popolanoj.

La heroaj soldatoj de Jihetuan brave bataladis kontraŭ la ĝisdente armitaj agresaj banditoj de la ok imperiismaj landoj volonte oferante sian sangon kaj eĉ sian vivon; ili montris sentiman revolucian spiriton de la ĉina popolo en batalo kontraŭ imperiismo. La imperiistoj sonĝis pri pereigo kaj disdivido de Ĉinio. Sed sub la bato de la feraj pugnoj de Jihetuan, ili devis konfesi, ke tio estas nur revo, kaj diris kun ĝemo, ke la pledo por disdivido de la ĉina teritorio estas ja deliro.

La revolucio de 1911 gvidata de Sun Jatsen estis landskala revolucia movado gvidata de la ĉina nacia burĝaro. Sun Jatsen elmetis la revolucian programon renversi King-dinastion, fondi ĉinan respublikon kaj egaligi terposedantecon. Sekve li starigis la revolucian ligon Tongmenghuj, elmetis la "Tri Popolajn Principojn" (t. e. naciisma, demokratia kaj popolviva principoj), organizis plurajn armitajn insurekciojn, finfine renversis la imperiisman lakeon King-dinastion, forpelis la imperiestron, likvidis la feŭdan imperiestran regadon de pli ol 2,000 jaroj, fondis respublikon kaj plantis demokratian penson profunde en la koron de la popolo. Sed la revolucia frukto baldaŭ estis forrabita de Juan Ŝikaj, lakeo bredita de imperiismo. Post la Revolucio de 1911, Ĉinio ankoraŭ estis subpremata de imperiismo kaj feŭdismo kaj la revolucia tasko de oponado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo ne estis plenumita.


Ĉiu el la revoluciaj bataloj en la moderna historio de Ĉinio estis sufokita de imperiismo kaj malvenkis. Sennombraj revoluciaj martiroj heroe batalis, tamen ne povis liberigi Ĉinion de la tragika sorto de duonkolonia kaj duonfeŭda socio. La kaŭzo kuŝis en tio, ke en la duonkolonia kaj duonfeŭda Ĉinio, la kamparanoj, kaj same la nacia burĝaro, ne povis gvidi la revolucion al ĝisfunda venko. La marksisma vero, ke **"la ĉina revolucio certe ne povos venki sen la gvidado de la proletaro"**, ja estas scienca resumo de la plej grava historia sperto de la ŝtorma revolucia batalo en la 80 jaroj de la moderna historio de Ĉinio.

# Traktoroj Tajŝan

La Ŝandong-a Traktora Fabriko projektita kaj konstruita de nia lando mem nun jam grandkvante produktas 25-ĉevalpovajn traktorojn kun marko "Tajŝan".

Dum la konstruado de tiu fabriko, la popolo de Ŝandong-provinco kontraŭbatalis ĝenadon kaj subfoson de la "kvarpersona bando", fabrikis en kunlaborado de la tuta provinco diversajn ĉefajn ekipaĵojn kaj muntis 33 produktajn liniojn, plene elvolvinte aktivecon de la centra kaj loka registaroj.

La ĝenerala produkta linio por traktoroj






Muntado de motoroj

Traktoroj "Tajŝan"



# Ekfunkciis la Daking-a Kemisterka Fabriko

La Daking-a Kemisterka Fabriko estas unu el la plej grandaj kemisterkaj fabrikoj de la nuna Ĉinio kaj ĝia konstruado estis sankciita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la estimata kaj amata Ĉefministro Ĝoŭ antaŭ sia forpaso. De majo de 1974, post penlaborado de pli ol du jaroj, venkinte la ĝenadon kaj subfosadon de la kontraŭpartia kliko de la "kvarpersona bando", oni rapidege kaj altkvalite finkonstruis ĝin en la dua tagdeko de junio de 1976. Ĝia unua prova produktado estis sukcesa. Nun, grandkvanta kemisterko produktita de ĝi estas senĉese transportata al aliaj lokoj por subteni agrikulturan produktadon.

La Daking-a Kemisterka Fabriko en nokto





Severa ekzamenado




Laboristoj, kadro kaj teknikisto esploras frostopreventon kaj termotenadon pri la ekipaĵoj.



Laboristoj faras rondiran kontroladon, persistante en la sistemo de postena respondeco.

Ŝarĝ-maŝino projektita de Ĉinio en laborado





Angulo de la Daking-a Kemisterka Fabriko


Transportado de kemisterko al aliaj lokoj



# Karmemoraj Kantoj pri Ĉefministro Ĝoŭ



Guo Lanjing kantas popolkanton de norda Ŝenhi *Brodado de Ora Honora Standardo* por prikanti Prezidanton Maŭ, Ĉefkomandanton Ĝu De kaj Ĉefministron Ĝoŭ.



Vira kaj virina dueto: *Profunda Karmemoro pri Ĉefministro Ĝoŭ*



Deklamo de poemo *Vin Sekvas Popolamasoj sur la Longa Strato*, kiu prezentas la adiaŭon de ĉefurbaj popolanoj al Ĉefministro Ĝoŭ.

Cetanĝolma de la Tibeta Kanta-danca Trupo kantas *Liberigitaj Servutuloj Karmemoras Ĉefministron Ĝoŭ*.



Vang Juĝen kantas *Kanto de Honghu-lago al Ĉefministro Ĝoŭ*



Virina solo «Kanto Dediĉita al la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ»



Pekinoperaj geaktoroj kantas «Karmemoro pri la Estimata kaj Amata Ĉefministro Ĝoŭ».



12859



世界语《中国报道》一九七七年第三-四期（本刊代号：二——九一五

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL